



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報通

4
1972

Lernantoj iras al laboro en mateno.



La Kadrolernejo de la Sepa de Majo de Ĉongven- distrikto de Pekino

La Kadrolernejo de la Sepa de Majo de Ĉongven-distrikto estis fondita en 1968, laŭ la brila Instruĉio de la Sepa de Majo de Prezidanto Maŭ. En la pasintaj tri jaroj, pli ol 1,800 kadroj kaj instruistoj tie lernis kaj sin hardis en fizika laboro kaj pli ol 800 el ili estis senditaj al novaj laborpostenoj, por servi al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Dum sia lernado, la lernantoj partoprenas klasan batalon, faras produktan praktikon kaj kontaktiĝas kun laboristoj kaj kamparanoj, tiel ke profunda ŝanĝo okazis al ilia spirita fizionomio kaj multe altiĝis ilia konscio pri klasa batalo, linia batalo kaj daŭra revoluciado.

Peniga laboro alportis abundajn fruktojn. Pli ol 66 hektaroj da fekundaj kampoj kaj fruktoĝardenoj estas kreitaj post formovo de sablomontetoj. En 1970, la kadrolernejo jam povis mem provizi sin per 70 % de la bezonataj grenoj kaj fundamente efektivigis memprovizon de manĝa oleo, legomoj kaj viandoj.



Ili kreis pli ol 66 hektarojn da kampoj per formovo de sablomontetoj kaj plenigo de lageto.





Ili laboras en sia memfondita fabriko de transistoraj laŭparoliloj.

(Sube maldekstre) Lernantoj intime interparolas kun kamarado Liu Ĝanki, sekretario de Hidajing-brigado troviĝanta proksime de la lernejo.

Liu Ĵukun, membro de la partia komitato de la lernejo, kiu laboris kiel kadro en Jan-an dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, konverse interparolas kun lernantoj.




Lernantoj prezentas memkreitan dancon
Transsendo de Imposto-greno al la Ŝtato
Fare de Batalantoj de Lernejo de la Se-
pa de Majo.



Rikoltado de legomoj







Rica rikolto di rizo jam estasanand
bla.

Relernado en Jan-an

ANTAŬ pli ol unu jaro, nombro da kadroj de Pekino venis al Jan-an por relernado. Inter ili estas malnovaj kompartianoj venintaj al Jan-an antaŭ pli ol 30 jaroj de diversaj lokoj de la tuta lando por fari revolucion sub la gvido de Prezidanto Maŭ. Tial, multaj kamaradoj forte emociiĝis, kiam ili enloĝiĝis en kavernajn domojn forlasitajn de ili antaŭ dekoj da jaroj, ekprenis pioĉojn, al kies uzado ili kutimiĝis, kaj lernis kaj laboris kune kun la Jan-an-anoj. Ili diris, ke en la periodo de la demokratia revolucio, stimule de la Jan-an-a spirito elkulturita de Prezidanto Maŭ, ili akiris la venkon de la revolucia milito; kaj hodiaŭ ili denove venis al Jan-an por relernado.

Li Fenghua, kiu sin hardas en Dangĝuang-brigado de Ĉuankou-komunumo de Jan-an-gubernio, estas unu el la "veteranoj de Jan-an".

Li Fenghua havas jam pli ol 50 jarojn. Antaŭ tridek unu jaroj, li aliĝis al la Okavoja Armeo en Jan-an kaj estis feliĉe sendita al la Centra Gvardio por plenumi la gloran taskon gardi Prezidanton Maŭ. Li gardstaris ĉe Janggialing kaj Vanggiaping, kie iam loĝis Prezidanto Maŭ kaj propraorele aŭskultis la paroladon de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo*. En la jaro 1947, li batalis en norda Ŝenhi sub la gvido de Prezidanto Maŭ. La granda revolucia praktikado de Prezidanto Maŭ ĉiam stimulas kaj kuraĝigas lin marŝi antaŭen.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, Li Fenghua sin mezuris laŭ la kriterio de kompartiano kaj trovis, ke lia ĉefa manko estas longtempe apartiĝi de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado kaj de la vastaj amasoj

de laboristoj kaj kamparanoj. Li do decidis iri al la plejfronto de la tri grandaj revoluciaj movadoj kiel ordinara laborulo kaj sin hardi en la amasa batalado.

Post la atingo al Jan-an, Li Fenghua iris al Dangĝuang-brigado dorsportante sian pakajon. Kiam li atente studis la instrukcion de Prezidanto Maŭ kune kun komunumanoj en kaverna domo, antaŭ liaj okuloj aperis scenoj de militaj jaroj de Jan-an antaŭ 31 jaroj. Prezidanto Maŭ instruis: **"Ĉiuj revoluciaj laborantoj de la tuta lando devas konservi por ĉiam la stilon de penema luktado en malfaciloj, sekvatan de laborantoj de Jan-an kaj Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono en la pasintaj pli ol dek jaroj."** Li firme decidis agi laŭ la instruo.

Somere la suno brulas kiel fajro en la montregiono de norda Ŝenhi. Li Fenghua nuddorse fosis kaj translokigis ŝtonojn sur monto kune kun komunumanoj. Li ĉiam rapidigis sin antaŭ la aliaj por kolekti fekaĵojn. Komunumanoj laŭdis: "Maljuna Li ankoraŭ konservas la revolucian spiriton de penema luktado en malfaciloj, kvankam jam dudek jarojn li vivis en urbo."

Foje, la brigado konstruis akvokonservejon, sed ĝia fundo tralasis akvon. Kion fari? Iuj junuloj proponis, ke oni ŝtopu la fendon en la fundo per cemento. Li Fenghua demandis al ili, ĉu oni povas trovi alian rimedon krom tio? Ili respondis malpacience: "Ne necesas cerbumi pri tio, ni raportu tion al la supera instanco por ke ĝi donu iom da mono por aĉeti kelkajn sakojn da cemento." Tion aŭdinte, Li Fenghua profunde konsciiĝis, ke kvankam uzi kelkajn sakojn da cemento estas

ja negrava afero, tamen grava estas tio, kian stilon la junuloj devas sekvi kaj en kia tradicio ili devas persisti. Li do rakontis al la junuloj pri la glora tradicio de la armeo kaj popolo de la limregiono, kiuj sub la gvido de Prezidanto Maŭ disvolvis vastan produktan movadon sinapogante sur propraj fortoj kaj peneme luktante en malfaciloj dum la Kontraŭjapana Rezistmilito. Aŭdinte lian rakonton pri tio, ke Prezidanto Maŭ persone kulturis legomojn kune kun batalantoj ĉe Janggialing, la junuloj estis tre kortuŝitaj kaj firme decidis heredi kaj daŭrigi por ĉiam la Jan-an-an spiriton kulturitan de Prezidanto Maŭ. Laŭ la propono de Li Fenghua, oni metis sur la fundo terpecojn kun herboj sur ili kaj ŝtopis la fendojn per argilo, tiamaniere oni ne nur elspezis neniun moneron, sed ankaŭ mallongigis la tempon de la konstruado. En la konstruado de la akvokonservejo, la junuloj ricevis vivan kaj profundan edukon pri revolucia tradicio.

La kavernaj domoj estas revoluciaj fornoj por forĝi novan generacion. En la periodo de la demokratia revolucio, multaj junuloj tie sin hardis kaj fariĝis firmaj revoluciuloj batalantaj por naciliberigo. Nun sub la direktado de la doktrino de Prezidanto

Kampano kore interbabilas kun lernantoj de la Kadrolernejo de la Sepa de Majo de Nannivan, Ŝenhi-provinco.




Maŭ pri daŭra revolucio sub la proletara diktaturo, la kadroj senditaj tien por fizika laboro pliapaŝe sin hardas en ideologio por altigi la konscion de daŭra revolucio.

Iu juna kadro jam aliĝis al la Kompartio, tamen li ankoraŭ estis influata de burĝara ideologio. En praktikado de fizika laboro en Jan-an li mem-konscie klopodis por ŝanĝi sian sentimenton. Por altigi sian klasan konscion, li petis malriĉkampanojn kaj malsuperajn mezkampanojn multe suferantajn en la malnova socio rakonti al li la historiojn de iliaj familioj kaj vilaĝo, kaj por reformi sian mondkoncepton li elpaŝis renkonte al danĝeroj. Foje, kiam okazis montodiluvo, li saltis en la torenton malgraŭ vivdanĝero por elpreni lignopecojn forportatajn de la fluo. Li estis forportita de grandega ondo pli ol 100 metrojn foren, tamen li sentis nenian timon kaj brave luktadis. Tiamaniere kune kun aliaj kamaradoj li dekkvarfoje saltis en la torenton kaj elakvigis lignon de la kolektivo pli ol kvar horojn. Pro tio li estis laŭdata de komunumanoj.

Ĉen Junĝen, kiu sin hardas en Hinŝihe-komunumo de Jiĉuan-gubernio, estis diplomito en universitato antaŭ ses jaroj. Li devenis de malriĉkampana familio en la sudo de nia lando, kiu

Kamarado Gaŭ Tongjoŭ de Zaŭjuan-komunumo de la gubernio Jan-an rakontas al kadroj el Pekino pri siatempaj revoluciaj aktivadoj de Prezidanto Maŭ.





Kadroj, venintaj de Pekino al Jan-an por ĝin helpi en konstruado, aktive partoprenas kolektivan laboron.

multe suferis en la malnova socio. Liaj tri pliaĝaj fratinoj devigite fariĝis infanaj fianĉinoj kaj lia frato mortis pro malsano. El la travivaĵoj de sia familio, li konsciiĝis ke se ne estus Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio ne estus lia hodiaŭa feliĉo. Tamen, dum longa tempo li ne atentis pri reformado de sia mondkoncepto. Alveninte al la kamparo de Jan-an, en la praktikado de klasa batalo, produktata batalo kaj scienca eksperimento, li trovis ke lia mondkoncepto multe diferencas de tiu de la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj. Foje Ĉen Junĝen organizis komunumanojn por studi la artikolojn de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo*, *Memore al Norman Bethune* kaj *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*. Post la legado de la artikoloj li faris multajn klarigojn. Poste, Ĉen Junĝen dorsportis grenon kune kun komunumanoj laŭ montvojeton. Kiam ili estis trapasantaj mallarĝan relative krutan vojeton apud rokmuro, li malfortiĝis pro timo, rigardante la profundan ravinon. Tiam Ĉen Junĝen vidis,

ke la sekretario de la partia filio de la brigado daŭre iras antaŭen malgraŭ sia malforta korpo kaj ankaŭ iuj maljunaj kamaranoj pene iris antaŭen viŝante ŝviton; kiam iu junulo admonis ilin ripozi, ili respondis: "Dank' al studo de la tri artikoloj de Prezidanto Maŭ ni havas firman volon, kvankam ni jam maljuniĝis!" Ĉio ĉi tio ĝuste montris la mankon de Ĉen Junĝen kiel intelektulo kiu ne interligas teorion kun praktiko. Li ekkomprenis, ke la proletara mondkoncepto ne estas io denaska nek povas estiĝi per si mem, sed formiĝas en la praktikado de senĉesa reformado.

De tiam, Ĉen Junĝen aktive partoprenis klasan batalon, produktatan batalon kaj scienca eksperimentadon, serioze legas verkojn de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ, kaj diligente reformi sian mondkoncepton. Pro lia rapida progreso, la partia filio de la brigado unuvoĉe akceptis lin kiel membron de la Komunista Partio de Ĉinio.

Bonaj “Konsilistoj”

EN Ĝoŭhiaŭmiaŭ-produktogrupo de Tajhe-gubernio, Anhuj-provinco, estas du kadroj senditaj de supera instanco por partopreni en fizika laboro. La komunumanoj nomas ilin bonaj “konsilistoj”. La du kadroj nomiĝas Ĉang Enpej kaj Liu Ŝuhua.

Kamarado Ĉang venis ĉi tien en decembro de 1969. En la tago de lia alveno, siblis la frosta norda vento. Komunumanoj hejtis por li fornon por ke li sufiĉe ripozu. Sed li, demetinte la pakajon, tuj eliris por viziti malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn sub la konduko de brigadaj kadroj. La brigado pretigis por li du ĉambrojn, sed li rifuzis tion. Li mem elektis por si malgrandan ĉambron.

La du kadroj persistas en kolektiva produkta laboro por hardi sian revolucian volon kaj remuldi sian penson. Kvankam ili estis pli kaj pli okupataj, tamen ili neniam forlasis la korpan laboron. Ĉiujare ili laboris respektive 270 plenajn tagojn.

Ili tre atente lernas noblan kvaliton de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Foje, Ĉang iris al brigada sanitarejo por preni medikamenton por iu malriĉkamparano. Tie iu alia malriĉkamparano suferanta de talia doloro petis kuracon. Kuracisto diris, ke li bezonis injekton kaj kataplasmon. Sed li diris: “La malsano estas ne grava!” Li nur lasis la kuraciston fari akupunkturon al li. Tiu afero profunde edukis kamaradon Ĉang. Antaŭe, kiam li malsaniĝis, li ĉiam esperis, ke kuracistoj donu al li pli karajn medikamentojn, sed neniam konsideris pri elspezo de la ŝtato. En komparo kun la malriĉkamparano, kiel frapantaj kontrastoj montriĝis!

La profunda klasa amo de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj al Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, ilia klara klasa starpunkto de amo kaj malamo, kaj ilia diligenteo kaj malluksemo ĉiumomente edukas la du kadrojn. Ili pli kaj pli amas malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkam-

paranojn. Iufoje, malriĉkamparano avino Li Kiaŭjin grave malsaniĝis. Vidante, ke ŝiaj gefiloj foriris pro aferoj, kaj ne estis homo por flegi ŝin, Ĉang Enpej sin turnis al ŝi kun helpo. Li portis por la avino trinkakvon, preparis manĝon, prenadis medikamentojn kaj rigardis ŝin plurajn fojojn en unu nokto. La avino kortuŝite diris: “Tia kadro ja estas kvazaŭ mia familiano.”

Antaŭ la Liberiĝo, Ĝoŭhiaŭmiaŭ havis nur salalkalan teron kaj ofte suferis de sekeco, tial ĝia produktokvanto de greno estis malgranda. Post la Liberiĝo malriĉaj kamparanoj fariĝis mastroj en politiko kaj ankaŭ ilia vivo fariĝis pli kaj pli bona. Tamen la afero progresis malrapide. La vastaj amasoj deziris rapide ŝanĝi la ekzistantan staton, sed la gvidantoj sin trovis en malharmonio, kaj la amasoj ne povis plene elvolvi sian aktivecon. Profitante la ŝancon, ke la grupestro Ĝoŭ Hinliang kaj la vicestro Ĝoŭ Hongbo malakordiĝis unu kun alia, klasa malamiko faris agitadon por akriigi ilian malpacigon.

Veninte al la loko, Ĉang kaj Liu faris detalan enketon. Ili opiniis, ke por bone konduki aferon de la grupo, la unua solvenda problemo estis solidareco de la du respondeculoj. Ili interparolis kun Ĝoŭ Hinliang. Liu atentigis al li, ke li devas agi laŭ la kvin kriterioj elmetitaj de Prezidanto Maŭ pri daŭrigantoj de la proletara revolucia afero. Li diris: “Estante kadro, vi devas esti kapabla unuiĝi kaj labori kune kun tiuj, kiuj havas opinion malsaman ol vi. Vi devas bone unuiĝi kun la vicestro kaj plenumi la taskon de revolucio kaj produkto en unuanimeco.”

Iun nokton, ili venigis la vicestron al lia patrino kaj petis ŝin rakonti pri la tragedia historio de lia familio en la malnova socio. Dum aŭskultado Ĝoŭ Hongbo larmis. Tiam Ĉang edifis lin: “Kial la vasta laboranta popolo vivis mizere en la pasinteco? Ĉar la regpotenco estis en la mano de ekspluataj klasoj. Hodiaŭ, se ni ne bone uzus la regpotencon por la laboranta popolo, ĉu ni ne estus kulpaj antaŭ Prezidanto Maŭ kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ĝoŭhiaŭmiaŭ? Por bone teni la regpotencon gvidantoj devas esti en revolucia unuiĝo. Vi devas vidi la bonajn flankojn de la estro kaj kune progresi.”

Krome, ili faris enketon pri klasa batalo kune kun komunumanoj kaj malkaŝis iun kulakon, kiu fabrikis malican onidiron por malbonigi la rilatojn inter la kadroj.

La fakto de klasa batalo kaj la pacienca helpo de Ĉang kaj Liu altigis la konscion de Ĝoŭ Hin-

Sane Kreski en la Vasta Kamparo

—Pri Vang Jueŝu, intelekta junulo reveninta en la
kamparon por partopreni en agrikultura produktado

1

En aŭtuno de 1962 Vang Jueŝu diplomiĝis en supera mezlernejo. Responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ, li revenis de Pekino al la hejmloko

liang kaj Ĝoŭ Hongbo kaj komprenigis al ili gravecon de revolucia unuiĝo. Iun vesperon Ĝoŭ Hinliang venis al Ĝoŭ Hongbo. Apenaŭ Ĝoŭ Hinliang enpaŝis en la ĉambron, Ĝoŭ Hongbo tuj iris renkonte al li kaj firme premis al li la manojn. Ĝoŭ Hinliang diris dolore: “Antaŭe ni ne bone unuiĝis, tio estas mia kulpo.” “Ne, pri tio mi kulpas; mi estis trompita de klasa malamiko,” diris Ĝoŭ Hongbo. Ju pli ili interparolis, des pli ili intimiĝis. Ili faris komunan ĵuron: Firme plenumu la revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj unuiĝu por gajni ankoraŭ pli grandajn venkojn.

Kiam la problemo de solidareco de gvidantoj de la grupo estis solvita, Liu Ŝuhua kaj Ĉang Enpej organizis amasojn por lerni verkojn de Prezidanto Maŭ.

Posttagmezon de antaŭtago de la Printempa Festo, la grupo okazigis kunvenon por rememori la pasintan amaron kaj pripensi la hodiaŭan feliĉon. En la nokto ĉiuj retrorigardis la iritan vojon en la pasintaj 20 jaroj, draste kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj similaj politikaj trompisto. La vastaj amasoj de komunumanoj decidis konstrui Ĝoŭhiaŭmiaŭ en novan socialisman vilaĝon sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Jukoŭ-brigado de Vuhiang-gubernio de Ŝanhi-provinco por partopreni en agrikultura produktado. Tiam la nigra vento de “tri pliigoj kaj unu fikso”^{*} estigita de Liu Ŝaŭki atingis la brigadon. Profitante la okazon, la klasaj malamikoj de la brigado ekagitis komunumanojn por disponigi teron, brutojn, ŝafojn kaj arbojn de la kolektivo al privata uzo.

Por grandigi produktokvanton de greno, ili unue devis trovi sufiĉan akvofonton por irigacio. Ĉang kaj Liu helpis kadrojn de la grupo fari planon pri fosado de lageto kaj puto. En frosta vintro de 1969, la membroj de la grupo pene laboris kaj fine elfosis lageton kaj puton, kio fundamente kontentigis la bezonon de irigaciado.

Dum scienca terkulturado, Ĉang Enpej, Liu Ŝuhua kaj junuloj, kiuj venis de urboj por tie loĝiĝi, estis tre aktivaj. Sub ilia helpo, la grupo unuafoje kulturis rizon kaj sukcesis produkti du specojn de agrikulturaj insekticidoj.

Sub la gvido de la partia komitato, dank’ al kuna klopodado de ĉiuj membroj de la grupo, kamaradoj Ĉang Enpej kaj Liu Ŝuhua kaj la intelektaj gejunuloj, la grupo ricevis tre grandan ŝanĝiĝon en produktado. Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, ĉi tie ĉiu hektaro da tero donis nur 1,500 kg. da greno, sed post plurjara klopodado la meznombra pohektara produktokvanto de greno en 1970 atingis 4,650 kilogramojn kaj tiu de kotono en 1971 estis 675 kilogramoj. En la lastaj du jaroj, la grupo aĉetis man-traktoron, pumpilon, vermicelan maŝinon, du kotonsensemigajn maŝinojn. La forto de kolektiva ekonomio pli kaj pli kreskas kaj la vivo de komunumanoj pli kaj pli boniĝas. La komunumanoj ekhavis sian propran rezervitan grenon.

Tiam Vang Jueŝu, kiu ĵus eniris en la socion, ankoraŭ ne komprenis, ke tio estas speguliĝo de la akraj bataloj inter la du klasoj kaj la du vojoj en la kamparo. Maljuna kompartiano Ĝaŭ Kĵuanĝong detale rakontis al li la historion de la klasbatalo de Jukoŭbrigado. Onklo Ĝaŭ diris: “Iuj pledas por individua produkto dum ni por kolektiva produkto, tio estas du malsamaj vojoj! Se ni ne batalos kontraŭ la klasaj malamikoj, ili subfosos nian socialisman kolektivitan ekonomion.”

Nokte, Vang Jueŝu serioze studis verkon de Prezidanto Maŭ *Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo* lige kun la klasbatalo de Jukoŭ. El ĝi li konis la aktivecon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por iri la socialisman vojon kaj vidis la batalon inter kolektiva kaj individua ekonomioj... Ju pli multe li studis la instruojn de Prezidanto Maŭ, des pli sereniĝis lia menso. Li do tage partoprenis en produktado, vespere lernis

kune kun la komunumanoj koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ kaj faris batalon kontraŭ tiuj, kiuj distrumpetis la kapitalisman vojon. Maljuna malriĉkamparano Vang Hujcun havis akran vidon kaj batalis decideme. Li kuraĝigis Vang Jueŝu dirante: “La kolektivigan vojon montritan de Prezidanto Maŭ ni iros ĝis la fino. Ni absolute malpermesos al iu ajn subfosi kolektivigon.” Post ripetada batalo Vang Jueŝu kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sukcesis haltigi tiun kapitalisman tendencon kaj persistis en la socialisma vojo.

Dank’ al hardado de la klasbatalo, Vang Jueŝu altigis sian konscion. Pro lia rapida progreso, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj elektis lin kiel kadron de la brigado, kaj nelonge poste li glorie aliĝis al la granda Komunista Partio de Ĉinio.

2

En kolektiva hakado de ŝtonoj por ordigi riverojn



Iutage dum rikoltado de milio en la kampo, Vang Jueŝu kaj komunumanoj parolis pri disvolvo de la kolektiva ekonomio. Ĉiuj tre zorgis pri tio. Malriĉkamparano Vu Ŝuĝen diris: “Antaŭ la Liberiĝo Jukoŭ estis malriĉa loko, kie plantaĵoj ne kreskis dum malabundeco de pluvo kaj estis forportitaj de akvo dum pluvado, tial la pomua produktokvanto de greno estis nur 30 kilogramoj. Post la Liberiĝo, dank’ al gvidado de Prezidanto Maŭ ni suriris la vojon de kolektivigo kaj disvolvis produktadon en certa skalo. Sed, pro manko de akvo, la produktokvanto de greno estas ankoraŭ negranda kaj nia kontribuo al la ŝtato nemulta, tial ni devas ĉiurimede ŝanĝi tiun stacion!” Alia diris: “Por ŝanĝi la fizionomion de Jukoŭ necesas unue konstrui ŝtuparajn kampojn kaj irigacian sistemon.”

La arda deziro de la amasoj pliprodukti grenon kaj pli multe kontribui al la ŝtato donis pro-

fundan edukon al Vang Jueŝu. Li pensis, ke ili certe pliproduktos grenon, se ili aŭskultos vortojn de Prezidanto Maŭ, serioze lernos de Daĝaj kaj transformos deklivajn kampojn en ŝtuparajn, kaj sekajn kampojn en irigaciatajn.

En la komenco de printempo de 1967, post unumonata enketado Vang Jueŝu ellaboris konstruan projekton de Jukoŭ sub la direktado de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Sur la bildo estis desegnitaj kampoj, riverbaraĵo, akvokonservejo, kanalo, domoj, arboj... Tamen, en la komenco de la konstruado de la akvobaraĵo ili jam renkontis multajn malfacilojn. Ne estis dinamito kaj instrumentoj, ili do mem tion faris. Por lerni ŝtonhakadon Vang Jueŝu kun kelkaj junuloj diligente sin ekzercis de frua mateno ĝis profunda nokto. Dank' al tio ili rapide posedis la teknikon kaj hakis milojn kaj milojn da ŝtonpecoj.

Por konstrui la baraĵon estis necese transporti ŝtonojn de la norda bordo al la suda bordo de Ĝanghe-rivero. Tiam glaciĝis la rivero. Vang Jueŝu do vektportis ŝtonojn kune kun la komunumanoj sur la glacio kaj ĉiufoje ili portis pli ol 100 kilogramojn. Tamen post kelkaj tagoj varmiĝis la vetero kaj maldikiĝis la glacia tavolo. Estis danĝere paŝi sur la glacio kaj ne troviĝis ponto super la rivero. Por garantii glatan iradon de la konstruado Vang Jueŝu kaj komunumanoj vadis en la frosta rivero kaj transportis ŝtonojn al la alia bordo. Ili laboregis 50 tagojn kaj fine plenumis la taskon de konstruado de la akvobaraĵo antaŭdate je unu monato, tiel ke Jukoŭ unuafoje havigis al si pli ol 6 hektarojn da irigaciataj kampoj.

Por pliprodukti grenon, en januaro de 1971 Vang Jueŝu proponis provkulturi rizon. Aŭdinte tion, iuj konservativuloj diris: "Jam estas kontentige, ke en montkampoj de Jukoŭ oni povas kreskigi maizon. Ĉu oni ankoraŭ deziras kulturi rizon? Kia revo!" Vang Jueŝu profundiĝis en amasojn kaj petis konsilojn de spertaj malriĉkamparanoj por trovi rimedon de rizkulturado. Li memfide



Vang Jueŝu interparolas kun komunumanoj.

diris al ĉiuj: "Ankaŭ en la antaŭlasta jaro, kiam ni proponis kulturi maizon, iuj diris, ke neniam oni kulturis maizon en Jukoŭ pro alteco de la montoj, maldikeco de la tertavolo kaj ŝtonozeco. Tamen post eksperimentado, la meznombra pomua produkto-kvanto de maizo kulturita en la unua jaro jam atingis 266 kilogramojn kaj en la dua jaro ili akiris riĉan rikolton sur grandaj areoj. Se nur ni serioze praktikos, ni certe povos kreskigi rizon en Jukoŭ."

Vang Jueŝu kune kun aliaj kvin junuloj faris eksperimenton en Juva. Sub teknika direktado de maljuna malriĉkamparano Vu Ŝuĝen, ili transformis du muojn de malfekundaj kampoj en rizkampojn per alkonstruo de kampeĝoj kaj ebenigo de la parceloj kaj transplantis rizidojn sur ilin. Ili zorge flegis la plantaĵojn kaj klopodis trovi en praktiko ĝustan metodon de rizkulturo. En aŭtuno, ili ricevis 850 kilogramojn da rizo de tiuj kampoj. Sukcesis la rizkulturado.

3

Dank' al hardado kaj provo de la Granda Proletara Kultura Revolucio, Vang Jueŝu ankoraŭ pli entuziasmiĝis. Kun alta batalvolo li grandpaŝe marŝas sur la revolucia vojo montrita de Prezidanto Maŭ.

En 1969, li estis elektita kiel sekretario de la partia filio de la brigado. En la pasinta jaro li fariĝis sekretario de la partia komitato de la komunumo kaj membro de la partia komitato de la gubernio.

La konfido de la Partio kaj popolo al Vang Jueŝu tre kortuŝis lin. De tiam li ankoraŭ pli diligente studas verkojn de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ. Firme sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ, li persistis en partopreno de kolektiva produktado, kiel ajn okupita li estis. Kvan-kam li ofte foriris por kunveni, li tamen partoprenis fizikan laboron pli ol 280 tagojn en ĉiu jaro.

Iutage en junio de la pasinta jaro, la partia komitato de la gubernio sciigis al Vang Jueŝu, ke li

preparu en du tagoj raporton pri la labora sperto de Jukoŭ-brigado kaj poste iru al la gubernia urbo por ĝin fari al kunveno. Li pensis en si: "Sperto troviĝas en la amasoj, kiel do oni povas ĝin elpensi en la domo?!" En tiuj du tagoj li kune kun komunumanoj diskutis kaj resumis sperton de la brigado dum kuna laborado sur la kampo.

La kunveno iris tri tagojn. Kiam finiĝis la kunveno, jam mallumiĝis. Por frue konigi al kamaradoj la spiriton de la kunveno, Vang Jueŝu rapidis al la komunumo en la sama nokto per kamiono kaj okazigis kunvenon de la partia komitato de la komunumo. Post tio jam estis profunda nokto. Kiam li sin pretigis por enlitiĝi, subite li ekmemoris, ke



Al laboro



Gejunuloj de la Kultivejo Fenghuangšan

SONG HISEN kaj LU HONGBIN

ANTAŬ tri jaroj, nombro da intelektaj gejunuloj de Ŝanhajo, Harbin k.a. lokoj venis al la kultivejo Fenghuangšan de Hejlonggiang-provinco. Ili sane kreskas sub la nutrado de Maŭzedongpenso. Jene ni raportas pri nia vizito al la loko.

NOVAJ FIŜISTOJ

Irinte nelonge orienten de la administrejo de la kultivejo, ni venis al la fiŝbredejo de ĝia filio Hongfeng. Tie ni vidis, ke junuloj lerte faras truojn en la glacio kaj metas reton en ilin. Poste dekkelkaj

komunumanoj de Jukoŭ-brigado fosas cisternon sur Nanja-monto. Malgraŭ laco li tuj rapidis al Jukoŭ kaj sin direktis rekte al la konstruejo anstataŭ hejmeniri.

Post penlaborado de du monatoj ili fine pretigis cisternon, kiu povas enteni 1,500 kubmetrojn da akvo kaj irigacii 13 hektarojn da montkampoj. Ili suprenportis 230 kubmetrojn da ŝtonoj por masoni la cisternon kaj poste en ĝin kondukis riverakvon.

Kiam la akvokonservejo estis finfosita, Nanja-monto bolis de ĝojo. Kamparanoj de najbaraj vilaĝoj foraj je 4-5 kilometroj venis por rigardi. 78-jara malriĉkamparano Lej Kajtian de Vanghaj-ju-brigado venis kun bastono, longe kaŭris ĉe la cisterno kaj ne volis foriri. Li ĝoje diris: “Antaŭ la Liberiĝo, por havigi al si iom da irigaciataj

kampoj, mia patro nomis min Kajtian kaj Gjuhe, esperante ke mia generacio povos irigacii kampojn per kolektita riverakvo. Sed tiam estis reĝimo de bienuloj kaj kulakoj, kiel povus efektiviĝi la deziro de la malriĉuloj. Nun sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, dank’ al influo de modela ago de Vang Jueŝu ni montregionaj kamparanoj efektivigis la deziron de pluraj generacioj.”

Tamen Vang Jueŝu pensis, ke tio nur estas komenco kaj la estontaj taskoj estos penigaj. Li firme decidis dediĉi sian junecon al konstruado de la nova socialisma kamparo.

** Ili estas plivastigo de parceloj por privata uzo kaj liberaj merkatoj, pliigo de etaj entreprenoj mem respondecas pri la propraj profitoj aŭ perdoj kaj la fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado.*

homoj eltiras la reton kaj vigle saltantaj fiŝoj svarmas ĉe la aperturo. Ili levis ambaŭmane fiŝojn 2-3 kg. pezajn kaj saltis de ĝojo. Tio estis la unua fojo de fiŝkaptado post la komenco de vintro. Per unu jeto de reto ili kaptis pli ol 4,000 kg. da fiŝoj.

En la lastaj jaroj, la intelektaj junuloj kaj maljunaj fiŝistoj bredis en la fiŝejo centojn da miloj da fiŝoj, kaj ĉiujare liveras al merkato multe da freŝaj fiŝoj.

Post sia alveno al la loko, ŝanhaja intelekta junulo Hju Longjuan ofte aŭskultis ĉe maljunaj fiŝistoj pri ilia tragika travivaĵo en la malnova socio. Ili fiŝkaptadis tutajn jarojn sed ne povis akiri minimuman vivpanon, tial multe da fiŝistoj sin dronigis kruele ekspluatate de tiranoj. Sed nun ili vivas feliĉe. El tio li ricevis profundan edukon kaj decidis pli bone konstrui la fiŝbredejon.

En la komenco Hju Longjuan respondecis pri kaptado de fiŝetoj. Ĉiutage li frue remis boaton sur la lago por meti fiŝkaptilojn. Ĉiutage li elprenis 4-5 fojojn la kaptilojn, sed la kaptitaj fiŝoj estis ne tre multaj. Li konsultis maljunajn fiŝistojn kaj ripetade praktikis. Per tio li mastris la metodon de kaptado de fiŝetoj per kaptiloj. Li grandigis la spacojn inter la kaptiloj kaj longigis la tempon inter la elprenoj de la kaptiloj, tial, kvankam la fojoj de elpreno malmultiĝis, tamen la kaptitaj fiŝoj obliĝis.

Por kapti pli multe da fiŝoj, li detale esploris la kutimojn de fiŝoj kaj la influon de vetero al ilia vivado, paŝon post paŝo konis la leĝojn de vivado de fiŝoj kaj laŭkondiĉe alprenis taŭgajn metodojn de fiŝkaptado. En tagmezo, la temperaturo estas kompare alta kaj la fiŝoj ŝatas naĝadi supre en akvo, tial li malprofunde enakvigas kaptilojn; en malsekna vetero, mateno kaj vespero la temperaturo



Atenta ekzameno de silkraŭpaj kokonojtravintrantaj

estas kompare malalta kaj la fiŝoj ŝatas halti sube en la akvo, tial li profunde enakvigas kaptilojn. Tiamaniere li grandigas la kvanton de kaptitaj fiŝoj. Nun Hju Longjuan ellernis ĉiujn teknikojn de printempa kovado ĝis surglacia fiŝkaptado kaj fariĝis lertulo en fiŝkaptado.

En la replekta grupo de la fiŝbredejo ni vidis ĝian estrinon Vang Ligjuan, intelekta junulino veninta de Harbin. Ŝi kaj la grupanoj diligente esploris kaj kreis novan teknikon de replektado per kiu ili grandigis la efikon pli ol sepoble. En duona jaro ili plektis 120 retojn por profunda akvo kaj 60 por malprofunda kaj superplenumis sian taskon.

KNABINOJ BREDANTAJ BOMBIKSOJN

Ni vizitis junulinojn bredantajn bombiksojn en la filio Fendoŭ de la kultivejo. Paŝinte en la varmetan ĉambbron de frajoj, ni vidis vicojn da framoj kun korboj de frajoj. Kelkaj junulinoj iradis inter la framoj por kontroli la travintradon de frajoj kaj registri temperaturon.

La junulinoj venis ĉi tien de Ŝanhajo en 1969. En la pasintaj tri jaroj dank' al instruado de maljunaj bredistoj ili mastris la teknikojn de bredado de bombiksoj kaj kreis kune kun la antaŭaj novan rimedon por bredi printempajn bombiksojn kaj travintrigi frajojn en alta kaj malvarma loko.

En la malnova scio neniu bredis bombiksojn ĉe la alta kaj malvarma Fenghuangŝan kun senprujna periodo de nur iom pli ol 100 tagoj. Kiam japanaj imperiistoj regis en la Nordoriento de nia lando, ili provis bredi bombiksojn proksime de Harbin por ekspluati la ĉinan popolon, sed malsukcesis. Tial ili konkludis, ke norde de 45 gradoj de la norda latitudo neniu sukcesos bredi bombiksojn. Post la Liberiĝo, la tieaj kamparanoj komencis bredi bombiksojn ĉe Fenghuangŝan en 48 gradoj de la norda latitudo kaj akiris sukceson kaj sperton.

En 1969, kondukate de bombiksobredaj kamparanoj, Vang Hujfang, Gu Mejhua, Vang Dandan kaj kelkaj intelektaj junulinoj suriris Fenghuangmonton. Ili forigis herbojn kaj ŝtopis la truojn de musoj kaj formikoj sub la arboj, kaj faris kverkarojn en bredejojn de bombiksoj. En la tagoj kiam kverkaj folioj disvolviĝis kaj la raŭpoj surmontiĝis la junulinoj flegadis ilin tagnokte. Somere, malgraŭ varmego ili tuttage laboris en bombiksa bredejo. Krome ili ankaŭ devis gardi la bombiksojn kontraŭ birdoj kun ĉaspafilo.

En la pasinteco la frajoj estis transportitaj de aliaj lokoj, por tio oni devis elspezi pli ol 6,000 jua-



Lu Vejven, intelekta junulino el Ŝanhajo, nun estrino de paŝtgrupo de ĉevaloj

nojn kaj krome tio bezonis multan homforton. La intelektaj junulinoj pensis: En la estonto ni faros grandskalan bredadon, ĉu estas bone dependi de aliaj lokoj en tio? En la unua jaro ili jam komencis eksperimenton pri travintrigado de frajoj. En vintro ili konservis la frajojn en konstante varmeta ĉambro, kaj antaŭ la varmiĝo de vetero, ili transmetis la frajojn en kelojn. En tiuj jaroj ili senĉese provadis kaj solvis la problemon de memprovizo de sufiĉaj frajoj. Ili senĉese plibonigas la metodon de bredado kaj akiris sinsekvajn riĉajn rikoltojn de kokonoj.

PAŜTISTINA GRUPO

Ni venis al la paŝtejo ĉe piedo de la monto Fenghuang. Galopis gregoj de ĉevaloj kaj ilin postkuris junulinoj paŝtantaj sur ĉevaloj.

Tiuj knabinoj konsistigas la paŝtan grupon de Fenghuangŝan-kultivejo. Ili venis de urboj. La



Paŝtado en vintro

grupo establiĝis en junio de 1969 kaj paŝtas pli ol 100 ĉevalojn de elita specio.

Ĉu sub la bakanta suno aŭ en tranĉa vento, la junulinoj persiste paŝtadas sur herbejo por la revolucio. Dank' al ilia zorgema paŝtado grandiĝis la gregoj. Por plimulti la nombron de ĉevaloj, en junio de 1970, la paŝtistina grupo kondukis la gregon al la herbejo Langdongŝan kie abundas herboj kaj akvo. Sed tie estas malmultaj loĝantoj kaj frekventas lupoj, kio multe malfaciligas paŝtadon.

En la unua vespero, la grupestro Lu Vejven kaj la paŝtistinoj Ĝaŭ Hiaŭjun kaj Bian Gjufang paŝtis la ĉevalojn sur la herbejo. Subite aŭdiĝis hurloj de lupoj. La grego disiĝis. La tri junulinoj tuj forraĵdis galope por serĉadi la forkurintajn ĉevalojn. Post duhora klopodo ili fine sukcesis venigi ĉiujn ĉevalojn al sia paŝta rezidejo.

La junulinoj de la paŝta grupo ellernis multe da scioj pri bredado de ĉevaloj en la pasintaj pli ol du jaroj. Kiajn herbojn la ĉevaloj ŝatas kaj kiam ili

devas trinki, kiom da nutraĵoj devas esti donita al ili, kiel kuraci iliajn malsanojn, kiel akuŝigi ĉevalinojn — pri ĉio ĉi tio ili bone konis. Ĉiuj iliaj ĉevaloj estas grasaj kaj fortaj. La junulinoj prizorgis la naskiĝon de 57 ĉevalidoj, kiuj ĉiuj kreskas bone kaj el tiuj iuj estis elektitaj kiel generaj ĉevaloj kaj aliaj portitaj al aliaj lokoj.

La junulinoj amas la herbejojn apud la monto Fenghuang, kaj pli amas la ĉevalojn. En la lasta printempo, sur la herbejoj okazis senpluveco kaj velkis la herboj. La ĉevaloj malgrasiĝis kaj la hararoj perdis sian brilecon. Ĉiun matenon la junulinoj suprenrigardadis al la ĉielo kaj esperis pluvegon. Sed tiel pasis unu monato, tamen ankoraŭ ne pluvis. Ili brulis de maltrankvilo kaj la grupestrino Lu Vejven diris: “Ni ne devas meti la esperon sur la ĉielon, ni mem fosu putojn!” Sub la helpo de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj ili rapide fosis du putojn. Kiam la ĉevaloj trinkis klaran akvon el la putoj, ili sentis nedireblan ĝojon. Sur la herbejo kaj ĉe la putoj eksonis gaja kanto.

Jang Bingkun Akiris Unuajn Fruktojn en Sciencia Kulturado de kotonplantoj

LA brigado Jangliuhjue (pri kiu ni raportis en n-ro 10 de 1970) de Janggi-komunumo de Ŝandong-provinco, kiu situas en la sala-alkala regiono en la malsupra baseno de la Flava Rivero, akiris refojan senprecedencan bonan rikolton en agrikulturo. La po-mua (1 muo=1/15 hektaro) produktokvanto de greno kreskis de pli ol 100 kg. ĝis 600 kg, kaj tiu de kotono de 15 kg. ĝis 70 kg. Tiuj fruktoj estis akiritaj dank' al lernado de Daĝaj kaj al sciencia terkulturado.

La membro de la partia filio de la brigado, la estro de la grupo de sciencia eksperimento Jang Bingkun faras kune kun amasoj sciencajn eksperimentojn, trovis iujn leĝojn de pliprodukto de kotono kaj greno kaj faris kontribuon al la ŝanĝo de la postiginta Jangliuhjue en progresintan. En aŭgusto de 1971, li estis asignita kiel kumula instruisto de la Agronomia Instituto de Ŝandong, kie li lekeiis pri la lernado de Jangliuhjue al Daĝaj, pri sperto de forigo de salo kaj alkalo akumulita post centoj da ekspe-

Jang Bingkun rakontas pri sia sperto en kulturado de kotono en iu agronomia kolegio.



rimentoj, pri solvo de la problemo de superkresko de kotonplantoj kaj falo de iliaj fruktoj kaj pri kuna kulturado de kotonplantoj kaj tritiko.

La 48-jara Jang Bingkun de sia infanaĝo jam komencis labori por bienuloj kune kun sia patro, suferante ĉiajn ekspluatojn kaj subpremojn. Li vizitis lernejon nur en 2 jaroj. Post la Liberiĝo, li lernis legadon kaj samtempe verkojn de Prezidanto Maŭ, per kio li rapide altigis sian klasan konscion. En organizado de interhelpa grupo, en starigo de agrikultura kooperativo kaj popola komunumo, li ĉiam iris en la antaŭa vico. La amasoj laŭdas, ke li ĉiam tutkore zorgas pri la kolektivo, sed li mem ĉiam opinias, ke li faris malmulte por ĝi. En Jangliuhjue, la grundo estis sala-alkala, la agrikultura tekniko postiĝinta kaj la produktokvantoj restis malgrandaj. Jang Bingkun pensis, ke nur post solvo de tiuj problemoj oni povos pligrandigi la produktokvantojn de koton kaj greno kaj fari pli multajn kontribuojn

al la ŝtato. Kie la produktokvantoj de koton kaj greno estas grandaj kaj kie oni uzas novan teknikon, tien li iris por lerni.

La partia organizo donis grandan prizorgon kaj subtenon al la revolucia entuziasmo de Jang Bingkun. Komence, la Partio nomumis lin teknikisto de agrikultura kooperativo; en 1958 ĝi sendis lin en la Agronomian Institucion de Ŝandong-provinco kie li lernis kelkajn monatojn. Reveninte al Jangliuhjue, li komencis sciencan eksperimenton kune kun aliaj por trovi metodojn de pliprodukto de koton.

Por mastri la leĝojn de kreskado de koton, Jang Bingkun tutjare observadis kaj esploradis en kotonkampo malgraŭ pluvo aŭ vento. En printempo, li forigis teron ĉirkaŭ la radikoj por esplori la kreskadon. En somero li zorge ekzamenis ĉu aperis insektoj kaj kiel kreskas la kotonplantoj, kaj klopodis bone flegi la plantojn. En aŭtuno li pendigis

Jang Bingkun (la viro) ekzamenas la efikon de la vegetaĵa stimulo "920" kun la sciencesploraj grupanoj.




al ĉiu floro etiketon, sur kiun li registris la tempojn de florado, fruktiĝo kaj lanugdono.

Post longa observado li trovis, ke por pliprodukto de kotonon oni nepre devas solvi la problemojn de superkresko kaj falo de fruktoj. Li konsultis multajn homojn, sed ne akiris solvon. Tamen li ne deprimiĝis kaj persistis en praktiko laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **“kiu ajn volas ion koni, ne povas fari alimaniere ol kontakti kun tio, t.e. vivi (praktiki) en ties medio”**. Iun tagmezon, subite en la ĉielo ruliĝadis plumbaj nuboj kaj ekpluvegis. Li vidis, ke pluvgutoj falis en la florojn. Ĉe kamprandoj, aero fluas pli vigle, tial la akvo en tieaj floroj rapide falis pro skuado de vento. Sed meze de la kampo la stato estis tute malsama. Li elektis kelkajn kotonarbojn, pendigis etiketojn sur florojn kun aŭ sen akvo. En la sekvinta tago, li vidis, ke la floroj sen akvo estis polenitaj dum la floroj kun akvo defalis. La trovo konigis al Jang, ke vigla aerfluado malmultigas falon de fruktoj. Ĉu oni ne povas grandigi la interbedojn por ke la aero fluu pli rapide kiel ĉe la kamprandoj? La brigado aplikis tiun proponon kaj ricevis rimarkindan efikon.

Alifoje, li rimarkis, ke iu oblikva kotonarbo donis pli multajn fruktojn ol la aliaj. Li pensis, ke kvankam tio estas hazarda, tamen certe estas kaŭzo en ĝi. Post detala esploro li trovis, ke parto de la radiketoj de la kotonarbo en la antaŭa periodo de ĝia kresko estis rompita en sarkado, kio bridis la superkreskon, malmultigis la konsumiĝon de nutraĵo, tial la kotonarbo donis pli multajn fruktojn. Laŭ tiu fenomeno li multfoje faris eksperimentojn pri rompo de parto de la radiketoj de kotonarboj dum ĝia florado kaj fruktiĝo kaj akiris samajn rezultojn.

Dank' al ripetada eksperimento Jang Bingkun trovis leĝojn por pliprodukto de kotonon, akiris serion da metodoj pri kotonkulturado, tiel ke la brigado akiris sinsekvajn riĉajn rikoltojn de kotonon.

Tri kvaronoj de la kampoj de Jangliuhjue-brigado estas kotonkampoj kaj antaŭe la bezonata gre-



Komunumanoj de Jangliuhjue-brigado sunumas kotonon.

no estis liverata de la ŝtato. Ĉu la brigado povas kulturi ankaŭ grenon? Subtenate de la partia filio, Jang Bingkun kaj la amasoj komencis elimini salon kaj alkalon kaj faris provon de kuna kulturado de kotonon kaj tritiko.

Sed tritiko kaj kotonon konkuris en suĉado de nutraĵo. La provoj en la unuaj du jaroj malsukcesis. Jang Bingkun resumis sperton, ĉerpis el tio lecionon kaj daŭre esploris la reciprokajn dependecon inter kotonon kaj tritiko. Kotonon ŝatas varmon kaj lumon, ankaŭ tritiko ŝatas kompare altan tertemperaturon en juneco, tial li pliraciigis la kunan kulturadon, por ke kotonon kaj tritiko utiligu unu la alian en baro de vento kaj konservo de varmo. La 7-punktaj kokcinoj kutime troviĝantaj sur tritikaj plantoj estas naturaj malamikoj de kotonaj afidoj. Tial kuna kulturado de kotonon kaj tritiko malebligis afidojn detrui kotonon. La eksperimento daŭris tri jarojn kaj la brigado samtempe akiris riĉan rikolton de kotonon kaj tritiko.



Onklo Ĝeng

EN la sekvinta tago post mia alveno al Songŝuling-brigado, mi ellitiĝis post duafoja kokeriko kaj ekiris al kampoj kun hojo sur la ŝultro. Mi iris el la domo tamen vidis neniun sur la vojo.

“Ankoraŭ neniu eliris,” mi pensis fiere. Sed kiam mi levis la kapon, mi vidis malklare ke multaj homsiluetoj moviĝas en maizaj kampoj sur la suda monto. Trovinte min jam malfruiĝinta, mi tuj kuris tien.

La maizoj pli altaj ol homstature dense kovris la montodeklivojn. Iliaj verdaj folioj senĝene etendiĝis, kvazaŭ montrante sian fortecon. La komunumanoj laboris jam longan tempon. Mi malfruiĝis kaj volis labori rapide. Tamen, mi antaŭe vivadis en urbo kaj tute ne sciis kiel manipuli hojojn.

Mi returnis la kapon kaj vidis alpaŝantan altstaturan kamparon kun kvadrata vizaĝo. Liaj okuloj tiel brilis kvazaŭ li estus ion pensanta. Ĉu li ne estas onklo Ĝeng Huanjong, komunisto kaj estro de la brigada asocio de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj?

“Malgranda Hju, mi instruu vin.” Li demonstris al mi uzadon de hojo. La hojo estis tre obeema al li. Proksime de la radikoj li sarkis malpeze kaj malprofunde, dum malproksime de

ili peze kaj profunde. La tero estis malkompaktigita kaj la herboj elradikigitaj. Li hojis rapide kaj tuj atingis la kampofinon. Li returniĝis kaj transdonis al mi la hojon. Mi vidis, ke li ne ruĝiĝis nek spiregis de la peno.

Onklo Ĝeng detale klarigis al mi pri la ĝusta maniero de hojado kaj instruis min kelkajn fojojn. Li foriris kontente kun rideto nur kiam mi tion ellernis fundamente.

Post nelonge, en la brigado vigle disvolviĝis la amasa movado de lerno de Daĝaj. Sur konstruejo de irigacia sistemo Onklo Ĝeng ordonis montrante ŝtonon 100 kg. pezan: “Daŝuan, Jusuo, metu ĝin sur min.”

La du junuloj tuforte levis la ŝtonon kaj atente metis ĝin sur la dorson de Onklo Ĝeng. Ordinaraĵoj eĉ ne havis la kuraĝon por ĝin movi, sed Onklo Ĝeng eĉ povis porti ĝin sur sia dorso.

Oni portadis ŝtonojn unuope aŭ duope. Ankaŭ mi volis provi. Sed Onklo Ĝeng tuj malkonsilis al mi: “Malgranda Hju, ne portu grandan.”

Mi tamen ne volis akcepti lian takson pri mia forto. Mi pensis en mi: Onklo Ĝeng, vi eraris. Koncerne al la stature kaj forteco, mi estas unu el la menciindaj en mia grupo.

Kiam Onklo Ĝeng forturnis sian atenton de mi, montrante ŝtonon 80-90 kg. pezan mi instigadis Daŝuan kaj Jusuo ke ili metu ĝin sur mian dorson. La du junuloj pririgardis min kaj hezitis. Sed ili ne povis rezisti kontraŭ mia senĉesa instigado kaj metis ĝin sur min.

Ho, kiel peze. Mi faris kelkajn paŝojn kaj sentis teruran subpremon, la kruroj tremis kaj mi spiregis. Oni admonis ke mi

tuj formetu ĝin, sed mi persiste portis ĝin ĝis la ravino kunpremanante la dentojn.

Subite paro da grandaj manoj transprenis de sur mi la ŝtonon. Mi returnis la kapon kaj vidis Onklon Ĝeng. Mi povis nenion diri pro emociiĝo.

Onklo Ĝeng formetis la ŝtonon kaj serioziĝis la mieno de lia sunbruna vizaĝo. Mi klinis la kapon, kiel erarinta infano antaŭ plenkreskulo.

“Ĉifoje mi devas kritiki vin. Ĉu tio estas ŝerco? Manĝaĵon oni devas preni buŝon post buŝo kaj hardiĝo devas trapasi certan procedon. Ni jam laboris multajn jarojn, sed vi ĵus komencis kaj jam volis tuj dikuliĝi post unu manĝo. Ĉu tio eblas? Prezidanto Maŭ sendis vin al ni por ke vi konstruu kune kun ni la montregionon. Se okazos al vi io neatendita, ni estos kulpaj antaŭ la revolucio kaj antaŭ vi!”

Kvankam Onklo Ĝeng kritikis min, tamen mi sentis varmon en la koro. Miaj okuloj humidiĝis.

Onklo Ĝeng supozis, ke mi ne povas elteni la kritikon kaj diris iom tenere:

“Nu, la kritiko estas tro severa?”

Mi kapneis.

“Junulo, ne deprimiĝu tuj post kritiko. Fakte mi ŝatas junulojn entuziasmajn. Nu, vespere ni interparolu senĝene.”

Mi rigardis Onklon Ĝeng kaj sentis, ke varma fluo trakuris mian tutan korpon. Onklo Ĝeng vere estas bona instruisto por ni intelektaj junuloj venintaj al la kamparo.

(Verkita de Hju Hua, intelekta junulo de Pekino veninta al kamparo)


Pekina Fabriko de Lanaj Litkovriilojen Prosperiĝo

La laboristoj kaj oficistoj de la Pekina Fabriko de Lanaj Litkovriiloj vige antaŭenpuŝas movadon de teknika renovigo por plibonigi la kvaliton kaj pliigi la variecon de la produktaĵoj. Ili sendis enketajn grupojn al la kamparo kaj vendejoj por kolekti opiniojn, kritikojn kaj proponojn de uzantoj kaj klientoj de iliaj produktaĵoj. Nun la produkta kvanto de la fabriko grandamezure kreskas kaj la kvalito de ĝia produktaĵo konstante leviĝas.



Laborejo por ŝpinado





Novaj specoj
de produktajoj



(Supre de la kontraŭa paĝo)
Transdono de tekniko al novaj
laboristinoj

Ekzamenado de produktajoj



Post kiam kamaradino Song Sujun estas elektita kiel membro de la partia komitato de la fabriko, ŝi aktive partoprenas en produkta laboro.



La projekta grupo diskutas pri la flordeseĝno kaj kvalito de nova speco de produktaĵo.

Multvariaj Specoj de Ĉinaj Lanaj Litkovriloj

LA produkto de lanaj litkovriloj en Ĉinio multe disvolviĝis post la Liberiĝo. La aĉetantoj ne povas ne admiri la multecon de la specoj, la belajn kolorojn kaj originalajn desegnojn de tiuj litkovriloj montrataj en la koncerna sekcio en ĉiuj grandaj magazenoj. Estas litkovriloj *Jacquard-aj*, striitaj, kvadratitaj, unu- kaj du-koloraj, ĉiuj allogas per sia aparta ĉarmo.

Tiuj litkovriloj ĝenerale estas faritaj el lano produktita en nia lando mem. En la Nordokcidento, Sudokcidento kaj Interna Mongolio de nia lando estas vastaj stepoj, kie ĉiam pli prosperas brutobredado. Kaj dank' al tio ke la paŝtistoj jam suriris la vojon de socialisma kolektivigo kaj ĉiam pli leviĝas ilia aktiveco en produktado, kaj ke rimarkinde progresis la kulturado de bonaj brutospecioj por plibonigi la lankvaliton, sufiĉaj kondiĉoj por produkti bonkvalitajn lanajn litkovrilojn estas kreitaj. La lanaj litkovriloj de nia lando estas strukture kompaktaj kaj lanugecaj. Ili estas laŭdataj de la uzantoj krome pro iliaj moleco kaj elasteo.

La *Jacquard-aj* lanaj litkovriloj de Ĉinio havas kolorojn kaj desegnojn riĉajn je la karakterizaĵo de la ĉina pentrarto. Iliaj koloroj estas harmonie aranĝitaj kaj iliaj desegnoj estas plaĉe originalaj en vigla stilo. Eĉ la unu- kaj du-koloraj estas tre okulplaĉaj per milda kolortono kaj multe ŝatataj de la uzantoj.

Antaŭ la Liberiĝo lanaj litkovriloj estis produktataj nur de malmultaj fabrikoj en kelkaj marbordaj urboj de nia lando. Nun en multaj lokoj estas starigitaj lanteksejoj produktantaj litkovrilojn, ĉiuj kun sia aparteco provizantaj la merkaton sub diversaj fabrikmarkoj, ekzemple, "Sleigh" (glitveturilo), "Spring Breeze" (printempa brizo), "Seal" (foko), "Panda" (pando) kaj aliaj el Lanĝoŭ, Harbin, Pekino, Interna Mongolio, Siĉuan kaj aliaj lokoj. Iliaj produktoj trovas bonan akcepton ĉe la klientoj.

Klopodante plibonigi la teknologion por produkti pli multe da bonkvalitaj litkovriloj el puraj

lanoj de ŝafo kaj kamelo, la ĉinaj teksistoj ankaŭ strebas por ekposedi novan teknikon por produkti litkovrilojn el artefarita lano, polivinil-kloridaj, akrilaj kaj diversspecaj miksitaj fibroj por kontentigi la bezonojn de diversaj klientoj. Ekzemple, la litkovriloj el artefaritaj fibroj kun dense staranta lanugo fabrikitaj de la Tiangin-a Lana Teksejo sub la marko "Swan" (cigno) estas belaj kaj fortikaj, kies surfaco donas impreson de ondetanta akvo kaj aspektas kaj mole kaj freŝe. La Ĝanggiakoŭ-a Lana Teksejo kaj la Lingi-a Lana Teksejo antaŭ nelonge fondita en Tibeto ambaŭ jam produktas litkovrilojn el polivinil-kloridaj fibroj kaj liveras novajn specojn bonvenajn al la uzantoj.

Novaj libroj el Vjetnamio

**Anekdotoj de Vojaĝo
Resumo pri Vjetnamio
La Horlogisto de Dien Bjen Fu**

Riceveblaj ĉe:

**Vjetnama Pacdefenda Esperantista
Asocio
68 Ly Thuong Kiet, Hanojo
Vjetnama Demokratia Respubliko**

Transmeti la Starpunkton al la Flanko de la Proletaro



*Meng Hianmin, profesoro
de la Gilina Medicina
Universitato*

MI estas ĥirurgia profesoro. Post la Liberiĝo mi min okupas per instruado, kuracado kaj scienca esplorado. En la Granda Proletara Kultura Revolucio mi akiris pli profundan konon pri la signifo de mia laboro kaj eklaboris pli diligente por kontribui al la medicino de la patrolando.

Mi longe vivis en la malnova socio, ricevis malnovan edukon kaj estis multe influita de la burĝara ideologio. Post la Liberiĝo, dank' al la zorgo kaj eduko de la Partio altiĝis mia politika konscio kaj mi aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio en 1953. Pro influo de la burĝara ideologio, mi ĉiam sopiris fariĝi "specialisto" kaj "aŭtoritatulo" en mia profesio, tial mi malmulte pensis pri servigo de medicino al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

En la kultura revolucio, mi min ĵetis en la tri revoluciajn movadojn de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado por akcepti reedukon de laboristoj kaj kamparanoj. Dank' al tio mi vere komprenis, ke nur la popolamasoj estas la forto, kiu kreas la historion kaj sociajn riĉaĵojn. Ĉu tutkore servi al la popolo aŭ klopodi por famiĝo kaj individua profito estas dividlinio inter revoluciaj kaj nerevoluciaj medicinaj laborantoj.

Post tio mi firme decidis diligente studi verkojn de Prezidanto Maŭ, modeste akcepti reedukon de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, elimini mian

burĝaran ideologion dum instruado kaj kuracado kaj vere transmeti mian starpunkton al la flanko de la proletaro.

En marto de 1970, gvidantoj komisiis al mi instruadon en iu medicina kurso de ĈPLA. Antaŭe kiam mi donis lekciojn pri "malgrandigo de premo al stomako kaj intestoj" kaj "eksperimento pri anafilaksio", mi ĉiam faris demonstradon per la malsanuloj. Sed kiel doni tiujn lekciojn al kursanoj-ĈPLA-anoj? Kiam mi ekmemoris la kortuŝan scenon, ke por kuraci mutulojn kamaradoj de ĈPLA faris eksperimenton sur sia korpo, mi do decideme petis fari eksperimenton sur mia korpo. Mi lasis alian instruiston enigi kaŭĉukan tubon en mian stomakon tra mia naztruo, per kio li klarigis pri "malgrandigo de premo al stomako kaj intestoj". Kvankam tio suferigis min, tamen ĝi kulturis en mi la penson tutkore servi al la popolo.

Por ke mi havu ŝancon hardiĝi en praktikado, la gvidantoj de nia instituto ofte komisiis al mi taskojn de urĝa helpo. Foje, mi ricevis taskon kuraci komunumanojn kun grava brulvundo en iu gubernio. En la nokto, spite al frosteco de pli ol 40°C sub nulo, mi tien veturis per aŭto. Post la atingo de la celloko frue en la sekvinta mateno, kamaradoj zorge diris al mi: "Doktoro Meng, vi unue ripozu, ĉar la tutan nokton vi ne dormis nek manĝis." Pensante pri la malsanuloj, mi rapidis al malsanula

ĉambro malgraŭ laciĝo, atente ekzamenis ĉiujn pacientojn kaj detale diskutis kun lokaj kuracistoj pri savrimedoj.

Tri el la brulvunditoj suferis de serioza septicemo kaj alta febro de 40°C kaj estis en vivdanĝero. Por observi la staton de la pacientoj kaj ĝustatempe fari kuracadon, mi tagnokte flegis ilin ĉe iliaj litoj. Mi persone injektis kaj ŝmiris al ili medikamentojn. Dank' al kuracado kaj flegado en kvin tagoj kaj noktoj, la tri vunditoj en krizo fine eldanĝeriĝis kaj post certa tempo ĉiuj vunditoj resaniĝis.

En la pasinteco, en mia kuracado, instruado kaj scienca esplorado mi superstiĉe kredis fremdlandan literaturon, ne kuraĝis rompi rutinon, praktiki kaj iri propran vojon de disvolvo de medicino de nia lando. En la granda kultura revolucio, rompinte la superstiĉon, unuflanke mi lernis sukcesan sperton de aliaj, aliflanke mi klopodis por krei novan sperton en mia praktikado. Unu afero donis al mi profundan edukon kaj plifirmigis mian fidon.

Foje iu virino kun nelonge naskita bebo en siaj brakoj venis al mi por peti kuracadon. La bebo suferis denaskan atrezion de anuso. Post ekzameno mi trovis, ke la atrezia parto de ĝia rektu-

mo distancis de la anuso je 7-8 centimetroj. Laŭ fremdlanda literaturo kaj mia sperto, oni ne povas restarigi anuson, se tiu distanco superas 2 centimetrojn. Mi do faris fistulon tra ĝia ventro por tralasi fekaĵon.

En la granda kultura revolucio, la patro de la infano denove venis al mi kaj diris, ke de multaj jaroj la infano elportis grandan suferon je la artefarita fistulo tra la ventro. Li diris ankaŭ: "Nun eĉ paralizitaj infanoj povas stariĝi post kuracado, ĉu vi ne povas fari ion por resanigi mian filinon?" La postulo de la patro estis ja komprenebla. Mi do decidis refoje fari operacion al la knabino.

Analizinte la staton de la malsanulino mi kaj miaj kamaradoj opiniis, ke la malnova limo de 2-3 centimetroj estas rompebla. Kvankam estas multaj malfaciloj en la operacio, tamen kun la penso nepre forigi la suferon de la malsanulino ni povas venki ilin. Ni kuraĝe kaj zorge faris la operacion, etendigis la rektumon de la knabino ĝis la anuso kaj sukcesis restarigi anuson por ŝi, tiel ke ŝi povas unuafoje feki tra la anuso. Ŝiaj gepatroj emocie diris: "Multajn dankojn, ke vi resanigis mian infanon. Tio estas venko de la medicina kaj higiena linio de Prezidanto Maŭ!"



Prof. Meng inter mongolaj paŝtistoj



Profesoro Meng Hianmin en Kamparo

*Li kulturis kuracis-
tojn por vilaĝoj.*



*Meng Hianmin faras
eksperimenton pri ana-
filaksio sur sia propra
korpo.*





Meng konstante rondiras al montvilaĝoj por doni kuracajn helpojn al nacimalplimultaj komunumanoj kaj starigis profundan amikecon kun ili.

Li vivas inter komunumanoj.

Meng Hiann'in kaj la 16-jara knabino, kiun li sanigis





Ŝanĝiĝo de Jukoŭ

GIN ĜONG kaj KI ŜAN

JUKOŬ estas vilaĝo en Tajhang-montaro de norda Ĉinio. En la periodo de la Kontraŭ-japana Rezistmilito, Jukoŭ fariĝis senhoma loko pro bruligo, masakro kaj rabado faritaj de la japanaj agresantoj. En la Liberiga Milito, la jukoŭ-aj popoloj en kunago kun la liberiga armeo venkis reaciajn armeanojn de Ĉiang Kajŝek en Baŝan-batalo. Dum la pasintaj 23 jaroj, sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ la jukoŭ-anoj konstruis sian lokon en riĉan kaj belan montvilaĝon.

Proksime de Jukoŭ-brigado sin trovas Hiŝan-monto, kie antaŭe estis fumplena batalejo. Nun oni kreis ŝtuparajn kampojn sur Hiŝan kaj kondukis tien akvon de Fuhi-rivero tra interkruciĝantaj kanaletoj, tiel ke ĝi jam fariĝis produktejo de greno.

Fuhi-rivero fluas inter la montoj Hiŝan kaj Dongŝan. En la pasinteco ĝi povis irigacii nur 25 hektarojn da kampoj norde de la vilaĝo, tamen la grandaj parceloj de kampoj oriente kaj okcidente de la vilaĝo suferis de sekeco en ĉiu jaro.

Konduki akvon de Fuhi-rivero al la montoj estis deziro de multaj jaroj de la jukoŭ-aj popoloj. En 1960, persistante en la socialisma vojo, la vasta komunumanaro de Jukoŭ repuŝis la malhelpon kaj detruon de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la renegato Liu Ŝaŭki kaj havigis al la kolektiva ekonomio plian disvolviĝon. En tiu jaro, la brigado uzis

40,000 juanojn el komuna fonduso por instali tri kilometrojn da altensiaj dratoj kaj unu kilometron da malaltensiaj dratoj kaj aĉeti transformatoron, kio pretigis kondiĉon por konduki riverakvon sur la montojn. En 1963 kaj 1968, ili konstruis du elektrajn pumpstaciojn kaj per tio kondukis riverakvon sur la montojn. Poste, por krei akvofonton ili fosis profundajn putojn, tiel faris plejparton de la kampoj de la brigado irigaciata kaj pli kaj pli grandigis la produktokvanton de greno. En 1971, la meznombra pomua produktokvanto de greno de la brigado estis 391.5 kilogramoj, t.e. 230 % pli granda ol tiu en 1953 antaŭ la fondiĝo de la kooperativo.

En la unua tago, kiam ni venis al Jukoŭ, sub la gvido de kamarado Pang Livej, maljuna milicana heroo kaj sekretario de la partia filio, ni vizitis la fruktoĝardenon sur Dongŝan-monto, sur kiu prosperas fruktarboj viciĝantaj unuj super aliaj sur vasta areo.

En la komenca periodo post la Liberiĝo, tie kreskis nur malmultaj sovaĝaj persikaj, abrikotaj kaj pomaj arboj. En 1955 ili sukcesis provplanti 60 pomarbojn. En la sekvinta jaro ili fondis arbidkulturejon kaj plantis la unuan nombron da pomarbidoj kaj vinberarbidoj. Tiam, post diskutado de la amasoj, la altgrada kooperativo ellaboris planon: forstumi malproksimajn altajn montojn, planti fruktarbojn sur malaltaj proksimaj montoj kaj en

kortoj kaj planti arbojn ambaŭflanke de ŝoseoj. Nun granda parto de tiu plano jam estis efektivigita. Jukoŭ-brigado nun jam havas pli ol 13,000 pomarbojn, pli ol 5,000 aliajn fruktarbojn kaj 84,000 arbojn por ligno.

En 1963, la unue plantitaj arboj komencis doni fruktojn. La produkto de fruktoj ŝanĝis la ekonomian staton de Jukoŭ-brigado, kiu antaŭe sin okupis preskaŭ nur pri agrikulturo. En 1971, ili rikoltis 240 tunojn da pomoj kaj 75 tunojn da aliaj fruktoj. Ilia totala valoro estis pli ol 119,000 juanoj. Samtempe bredado kaj flankaj okupoj troviĝas en disvolviĝo.

Sur la draŝejo apud la vilaĝo kaj en bredejo aŭdiĝas bruado de maŝinoj de tempo al tempo. Tiu brigado havas 55 maŝinojn por irigaciado, plugado kaj prilaborado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktajtoj.

Nun en Jukoŭ multaj pezaj laboroj estas farataj de maŝinoj anstataŭ homoj. Tamen antaŭ la kooperigo ĝiaj loĝantoj havis neniun maŝinon kaj nur



En la tempo, kiam pomoj maturiĝas

Bonspecia ŝafaro de Jukoŭ-brigado





Angulo de fruktoĝardeno de Jukoŭ-brigado

tre malmultajn ĉarojn. En la komenca periodo post la fondiĝo de la kooperativo, la tuta vilaĝo havis nur unu ĉaron kun feraj radoj. Tiam ĉiu familio havis tri specojn de vektoj por porti diversajn objektojn. Printempe ili vektoportis semojn kaj sterkojn sur la montojn laŭ zigzagaj vojoj; aŭtune ili portis hejmen grenon kaj velkintajn tigojn de sur la montoj. Pro tio oni nomis la vektojn “dorsokurbigiloj”. Post la agrikultura kooperigo oni komencis aĉeti ĉarojn kaj ĉevalojn. Nun ili jam havas 6 ĉarojn kun pneŭmatikaj radoj, 71 malgrandajn ĉarojn kaj konstruis 8 ŝoseojn kun totala longeco de 14.5 kilometroj. Antaŭ la agrikultura kooperigo tie estis nur unu vojeto, sur kiu ĉaro ne povis sin turni kaj du ĉevaloj ne povis stari unu apud la alia. Nun la ŝoseo ambaŭflanke borderita per arboj sin etendas foren de la vilaĝo. Sur ĝi du aŭtomobiloj povas paralele veturi, kaj vojoj por ĉaro serpentumas sur la montoj Dongŝan kaj Hiŝan. Nun oni uzas vektojn preskaŭ nur por porti akvon. Per maŝinoj ili draŝas, prilaboras grenon, furaĝon kaj olematerialon. Komunumanoj humure diris: “Nun la vektoj dormas kaj ŝtonaj mueliloj ripozas.”

La disvolviĝo de la produktado kaj plimultiĝo de la komuna fonduso plibonigis la produktajn kondiĉojn, kio pliapaŝe akcelis la disvolviĝon de la produktado kaj pli multigis la komunan fonduson.

En 1955 ilia komuna fonduso havis nur pli ol 860 juanojn, tamen la sumo akumulita jam atingis pli ol 50,000 juanojn en 1971. En la fiksa kapitalo kun valoro de pli ol 636,000 juanoj en la tuta brigado, la sumo por ekipaĵoj kaj ĉaroj okupas 20 %, t.e. pli ol 125,000 juanojn.

Kun la disvolviĝo de la produktado, pli kaj pli multiĝis la enspezo de la komunumanoj de Jukoŭ kaj ĉiam pliboniĝis ilia vivo. Ni vizitis la familion de malriĉkamparano-komunumano Guo Faĝong, kiu fuĝis tien de Linhian de Henan-provinco en 1946 pro natura katastrofo. Tiam la tuta havaĵo de lia familio estis nur vekto, fera kaldrono kaj iom da litaĵoj. Li pene laboris kiel tagdungito kaj forĝisto, kaj vivis tre mizere. Nun lia familio kun 7 membroj havas biciklon kaj sufiĉe da vestaĵoj kaj litaĵoj. En 1970, dank’ al siaj tri laborkapabluloj ĝi ricevis 700 juanojn da mono krom greno kaj aliaj vivbezonaĵoj.

Ankaŭ familioj kun multaj membroj kaj malmultaj laborkapabluloj vivas nemalbone. Tion pruvis la familio de komunumano Pang Gujbaŭ. Antaŭ la Liberiĝo, ne povante vivteni siajn filon kaj edzinon, la patro de Pang Gujbaŭ iris al Baŭtoŭ por tie labori kiel rikiŝisto. Lia patrino devis reedziniĝi al alia viro kaj li mem devis labori kiel tagdungito. Nun el la dek membroj de lia familio nur li sola estas tute la-



Direkti Veturadon

per Materiisma Dialektiko

de la Ŝanhaja Transporta Grupo de 150-tuna Remorko

NIA grupo estas starigita en la Granda Proletara Kultura Revolucio. Ĝia tasko estas transporti gigantajn ekipaĵojn por la ĉefaj konstruaj unuoj en diversaj lokoj de nia lando. Por kontentigi la bezonon en transporto de gigantaj ekipaĵoj, la ŝanhajaj laboristoj speciale faris 150-tunan platan remorkon kun longeco de pli ol 14 metroj kaj larĝeco de pli ol 3 metroj. Farante kontribuon al la socialisma konstruado de la granda patrolando per tia remorko, ni sentas eksterordinaran gloron.

En transportado de gigantaj ekipaĵoj per la remorko, ni renkontis nemalmultajn malfacilojn en veturado sur montaj, deklivaj kaj mallarĝaj vojoj kaj danĝeraj pontoj. En ligo kun nia praktikado, ni persistis en studo de filozofiaj verkoj de Prezidanto Maŭ kaj akiris certajn sukcesojn en direktado de veturado per materiisma dialektiko.

Kiam ni unuafoje veturis aliloken por plenumi taskon, ni devis transporti ekipaĵon kun pezo de pli ol 130 tunoj. Tiam ni ne havis tiel grandan gruon, kaj eĉ se ni havus ĝin, ni tamen ne povus ĝin treni kun ni por solvi la malfacilon en malŝarĝado. Iuj kamaradoj de nia grupo proponis plenumi la taskon de ŝarĝo kaj malŝarĝo poparte, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ: **“Militon oni povas fari nur batalon post batalo, kaj la malamikojn oni povas ekstermi nur parton post parto. Fabrikojn oni povas konstrui nur unun post alia, kaj la kamparanoj povas plugi nur pecon post peco.”** Ĉiuj aprobis la proponon. Unue ni levis iun angulon de la giganta ekipaĵo per kriko kaj ŝovis sub ĝin ŝtalajn tubojn, kaj poste levis alian angulon kaj ŝovis ankoraŭ kelkajn ŝtalajn tubojn sub ĝin, ĝis la tuto ne plu tuŝis la teron. Tiam ni trenis ĝin sur la

borkapabla, tamen post la popola komunumigo li neniam havis ŝuldon kaj la vivo pli kaj pli boniĝis.

Antaŭvespere de la Novjaro estis tempo por dividi la enspezojn inter la komunumanoj. La totala sumo kiun oni devas dividi en 1971 atingis 123,500 juanojn, kaj la meznombra enspezo de ĉiu familio estis 650 juanoj, t.e. 210% pli multa kompare kun tiu en la komenca periodo post la kooperigo en 1955 kaj 6.5% pli multa kompare kun tiu de 1970. Antaŭ la Liberiĝo nur bienuloj de la vilaĝo havis du biciklojn; nun la tuta brigado havas 162 biciklojn kaj 48 kudromaŝinojn. Post la dividado de la rikoltaĵo en aŭtuno de 1970, 148 el la 186 familioj de la tuta brigado havis deponitan monon. La totala sumo atingis pli ol 45,000 juanojn kaj ĉiu familio meznombre deponis 320 juanojn. Antaŭvespere de la dividado de labor-

fruktoj en 1971, la meznombra sumo de la restanta depono de ĉiu familio estis 100 juanoj.

Kun la disvolviĝo de la kolektiva ekonomio kaj plimultiĝo de la enspezo de la komunumanoj, pli kaj pli multiĝas la novaj domoj en Jukoŭ. Kaj ankaŭ la aferoj de kulturo, eduko kaj higieno de tiu loko havis certan disvolviĝon. Antaŭ la kooperigo, la vilaĝo havis nur elementan lernejon, nun ĝi jam fondis lernejon kun sistemo de 7-jara lernado kaj ĉiuj lernaĝaj infanoj vizitas lernejon. Komunumanoj diris kun forta emocio: “Estas la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, dank’ al kiu ni povas ĝui la hodiaŭan feliĉon!”

Sed Jukoŭ-brigado ne kontentas pri siaj atingoj. Nun la vastaj amasoj de la komunumanoj entuziasme faras novan kampan konstruadon.

gigantan platan remorkon per vindaso laŭ la vojo formita el ŝtalaj tuboj. Atinginte la konstruejon, ni sekure plenumis la malŝarĝon per la sama metodo.

En praktikado de ŝarĝo kaj malŝarĝo, iom post iom ni konis kaj posedis multajn leĝojn kaj senĉese altigis nian kapablon en tiu afero.

Foje ni ricevis taskon de transportado de tuta altfornega ŝelo kun diametro de 10.5 metroj, alteco de 34.5 metroj kaj pezo de 280 tunoj. Ĝia pezo superis la ŝarĝkapablon de la remorko je cent procentoj, ĝia longeco superis tiun de ĝi je 150 procentoj kaj ĝia larĝo superis tiun de ĝi je duoblo. Estis malfacile fiksi kaj transporti tiel gigantan ekipaĵon sur la plata remorko. Sed ni pensis, ke la giganta ekipaĵo estas projektita kaj farita mem de laboristaj amasoj, laŭ la bezono de la konstruado de la patrio, ni nepre devas elpensi rimedon por ĝin transporti al la konstruejo.

Laŭ la vidpunkto, ke praktiko estas unuaeca, ni serioze resumis nian sperton kaj kuraĝe faris novajn praktikojn.

En la komenca periodo post la Liberiĝo, kiam ni ankoraŭ ne havis platan remorkon, ni uzis duradajn ĉarojn interligitajn por transporti grandajn ekipaĵojn; ni ekhavis platajn remorkojn de dekkelkaj tunoj, 20 tunoj kaj 60 tunoj nur post 1958. Tiutempe, ni transportis ekipaĵon kun pezo de 40-50 tunoj per 20-tuna plata remorko kun helpa instrumento kaj transportis ekipaĵon de ĉ. 100 tunoj per 60-tuna plata remorko sammaniere.

Laŭ la sama principo, ĉifoje ni aldonis 32-radan remorkon antaŭ la 150-tuna giganta plata remorko, tiel ke ili formis interligitan tuton, kies longeco estas reguligebla por konformi al la bezono por transporto de la altfornega ŝelo. Ni aldonis selformajn subtenilojn sur ambaŭ ekstremoj de la veturilo por ke la altfornega ŝelo restu senmova sur la vojo.

Survoje nia giganta plata remorko kun kolosa ekipaĵo ofte renkontis pontojn kaj ŝoseojn netraverseblajn.

Foje ni transportis gigantan ekipaĵon kun pezo de 120 tunoj tra vojo kun 16 betonaj pontoj, por kiuj la limigita pezo de trapasanta veturilo estis 13 tunoj kaj tiu de raŭpotraktor 60 tunoj. Ĉu nia remorko kun pezo de cent kelkdek tunoj povas trapasi ilin? Iuj pontokonstruaj teknikistoj opiniis, ke tio estas neebla, ĉar la ponto falos sub tropezo. Ni pensis, ke ĉiuj konkludoj naskiĝas post esplorado kaj antaŭ ol bone koni la kontraŭ-

diron inter la elporta povo de la pontoj kaj la pezo de la veturilo, ni ne devas fari konkludon facilanime.

Ni analizis jenan fenomenon: Kial ponto por traveturo de 13-tuna kamiono povas lasi 60-tunan raŭpotraktoron trapasi? La kaŭzo kuŝas en tio, ke la raŭpoj kontaktas kun la ponto je pli granda areo ol la radoj de kamiono. Ju pli granda estas la kontakta areo, des pli malgranda estas la pezo sur ĉiukvadrata centimetro de la surfaco de la ponto. La kontakta surfaco de la 150-tuna plata remorko kun 56 pneŭmatikoj estas pli ol 200 procentojn pli granda ol tiu de raŭpotraktor, do ponto tra kiu povas trapasi 60-tuna raŭpotraktor, ankaŭ povas lasi trapasi gigantan platan remorkon kun pezo de pli ol cent tunoj. Laŭ antaŭa sperto, se veturilo kuras rapide, ĝi vibras forte kaj premas peze al la ponto; se la veturilo iros malrapide sur la ponto, tiam ĝi premos malpli forte al la ponto.

Antaŭ la ekiro de la veturilo, ni mobilizis lokajn popolamasojn por plifirmigi iujn pontojn relative malsolidajn kaj tiamaniere ni glate irigis la remorkon kun la kolosa ekipaĵo tra la pontoj.

Alifoje, ni transportis gigantan ekipaĵon trans altan monton. Ĉe montotalio, kie la vojo ekiras malsupren, troviĝis kurbo kun mallonga radiuso de nur 10 metroj, dum nia giganta plata remorko kaj la tir-aŭto antaŭ ĝi estas tiel longa, ke ili bezonas kurban vojon kun radiuso de almenaŭ 10.4 metroj por sin turni. Kiamaniere trapasi la malfacilan vojon? En la komenco iuj proponis dekroĉi la aldonitan tiraŭton kaj tiel mallongigi la veturilon. Sed la plejmulto de la grupanoj opiniis, ke sen la aldonita tiraŭto, eble la giganta plata remorko ne povos ascendi la monton kaj eĉ glitos en abismon. Konsiderante ke la radiuso de la kurba vojo estas neŝanĝebla, dum la longeco de la veturilo povas aliĝi, ni trovis, ke la ĉefa flanko en la kontraŭdiro inter la remorko kaj la akuta vojkurbo estas la unua, kaj sekve ni elpensis jenan rimedon: mallongigi la distancon inter la tiraŭto kaj la remorko kaj tiamaniere mallongigi la sinturnan radiuson de la veturilo al malpli ol 10 metroj. Kiam ĝi sin turnis, la ŝoforo akcelis la motoron kaj veturis tra la kurbo per plena rapideco.

En la lastaj jaroj, alveninte al iu loko, ni senescepte serioze esploris la vojsurfacon, la pontojn, terformojn, grundon, deklivon kaj la vojlinion; venkis diversajn malfacilojn kaj transportis gigantajn ekipaĵojn al 18 provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj de nia patrolando.

La Agrikultura Produkto de Liaŭning-Provinco Akiris Rimarkindajn Atingojn


Liaŭning estas unu el la bazoj de peza industrio de Ĉinio. Ekde la granda kultura revolucio, la popolo de tiu provinco firme plenumis la ĝeneralan principon difinitan de Prezidanto Maŭ por disvolvi la nacian ekonomion preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidan faktoron, profunde disvolvis la movadon de "lernado de Daĝaj en agrikulturo" kaj akiris sinsekve bonajn rikoltojn en agrikulturo. En 1971, la tuta provinco akiris riĉan rikolton de greno, kaj plene disvolviĝis ĝia produktado en forstumado, bestobredado, flankaj okupoj kaj fiŝado.

Antaŭe sablejo ofte atakata de sablo-
vento kaj inundo, nun fekunda kamparo.





Pli ol 26,000 hektaroj da ŝtopaj kampoj estas konstruitaj en la mont-regionoj de Liaŭning-provinco.





Traktoroj plugas.



La riverbaraĵo konstruita de Fangci-komunumo en Jingkou-gubernio ebligas irigacion al 400 hektaroj da kampoj per memflua akvo.



Scienca sekcio de produkta grupo elektas semon surkampe.


Rikoltado de maizo



(Sube maldekstre) Rikoltado de brasikoj en aŭtuno

Sunumado de nove rikoltita kotono






Enverŝo de rikoltitaj arakidoj
en tenejojn

En brutobredejo oni kulturas
kaj disvolvas bonajn speciojn



Riĉa rikolto de greno





Kadroj kaj komunumanoj kune resumas sian sperton en akiro de riĉa rikolto

Riĉa rikolto de pomoj



Ferulo

Vang Ginhi

GJU HINHUA



Vang Ginhi, elstara reprezentanto de la ĉina laborista klaso

FERULO Vang Ginhi estas heroa reprezentanto de Daking-petrolkampo. Per la revolucia praktikado de sia tuta vivo, li starigis por la ĉina popolo brilan ekzemplon de avangarda batalanto de la ĉina laborista klaso armita per la granda Maŭzedongpenso.

FERULO

En printempo de 1960, kiam nia lando trafis seriozan naturan katastrofon, imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj kune oponis kontraŭ Ĉinio kaj praktikis ekonomian blokadon kontraŭ ĝi, kaj la renegata kliko de la sovetunia reviziismo intencis nin sufoki per ĉesigo de provizado de petrolo. Ĝuste en tiu momento, disvastiĝis la ĝojiga novaĵo pri la malkovro de Daking-petrolkampo en nia lando. Laŭ la instrukcio de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, disvolviĝis kampanjo por ekspluati Daking-petrolkampon per koncentritaj superecaj fortoj sur la petrolindustria fronto de nia lando. Kun la drilista grupo 1205 sub sia gvido, Ferulo Vang Ginhi rapidis al Daking de la malproksimega urbo Jumen.

La vagonaro veturanta de Jumen al Daking galopadis sur senlima vastaĵo de nia granda patrolando trapasante novajn industriajn urbojn unu post alia. Pensoj ondadis en Vang Ginhi kiel nedetenebla tajdo. Ĉio, kion li vidis dum la kunveno de laborherooj de la tuta lando okazinta en Pekino en 1959, denove aperis en lia menso. Tiam li unuafoje vizitis Pekinon kaj vidis, ke la aŭtobusoj sur la stratoj portas po grandan pufan sakon sur la kovrilo. Li demandis

aliajn kun miro: “Kial kunporti tion? Oni diris al li: “Pro manko de benzino, oni devas uzi gason anstataŭe.” Tion aŭdinte, li ne plu demandis. Li pensis: “Por lando tiel granda kiel la nia, benzino ja estas nemalhavebla. Vidante la ŝtaton en tia malfacilego, ĉu mi petrola laboristo ne hontas demandi pri tio?” Ju pli longe li pensis, des pli peziĝis lia koro. Kiam li kunvenis en la Popola Halo, lia animo ĉiam estis en emocio. Dum la paŭzo, senvorte li iris al kvieta angulo kaj silente fumadis...

Ĉiufoje, kiam li ekpensis pri tio, li sentis, ke la gassako pezas sur lia koro kvazaŭ plumbo. Plurfoje li diris al siaj kunbatalantoj: “Se homo ne havas sangon, la koro ĉesas bati. Se ne estas petrolo, tiam paneas ĉiuj maŝinoj flugantaj en la aero, kurantaj sur la tero kaj veturantaj en la maro. Se nia ŝtato suferas de manko de petrolo, ni laboristoj ja devas respondi pri tio.”

Ĝuste kun tia nobla devo solvi la problemon de petrolo por la ŝtato, Vang Ginhi kaj liaj kunbatalantoj venis al Daking. Kiam li vidis dekmilojn da kunbatalantoj venintaj de diversaj lokoj de la lando por partopreno en la kampanjo, la ekipaĵojn amasigitajn laŭlonge de la fervojo kun longeco de dekoj da kilometroj kaj la senliman petrolkampon ekspluatotan, li sentis sin plena de energio. Starante emocie sur la dezerta stepo, li kvazaŭ vidus la vastan petroltavolon sub la stepo. Li malfermis sian ŝafpelton kaj laŭte diris al siaj kunbatalantoj: “Jen la granda petrolkampo, kaj ĉifoje ni falis en petrolan maron! Kamaradoj, ni eklaboru per la drilego!”

Estis marto. Ĉe Daking hurlis norda vento, kaj akvogutoj povis glaciigi tuj je la falo. La kampanjo disvolviĝis tre rapide. Veninte de diversaj partoj de la lando, la dekmiloj da konstruantoj vizaĝis al multaj neimageblaj malfaciloj sur la vasta stepo: ne estis ŝoseoj, ne sufiĉis veturiloj, kaj estis malfacile solvebla la problemo de manĝado kaj loĝado.

Por venki la malfacilojn kaj akiri venkon, la partia komitato de la petrolkampo alvokis al la oficistoj kaj laboristoj partoprenantaj la kampanjon studi la verkojn de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko* kaj *Pri Kontraŭdiro* kaj direkti la batalon per Maŭzedongpenso. Sub la gvido de la partia komitato de la petrolkampo, la vastaj amasoj de la petrolaj batalantoj serioze studis kaj entuziasme diskutis ĉiuvespere verkojn de Prezidanto Maŭ ĉirkaŭ kampofajro kaj en staloj. Sub la gvido de Vang Ginhi, la drilista grupo 1205 studis kaj diskutis, dum pluraj sinsekvaj vesperoj, pri la demandoj kio estas la ĉefa kontraŭdiro en la momento kaj kiel sinteni kontraŭ malfaciloj. La studado kaj diskutado alportis al ili ĉiam pli grandan entuziasmon. La laboristoj diris unuvoĉe: “Kiel povas ne esti malfaciloj en konkero de granda petrolkampo? Sed inter la diversaj malfaciloj kaj kontraŭdiroj, la plej granda malfacilo kaj la ĉefa kontraŭdiro estas la manko de petrolo de la ŝtato. Se tiu ĉi kontraŭdiro ne estos solvita, imperiismo kaj moderna reviziismo ĝin utiligos por bloki nin. Ni neniam devas fleksiĝi antaŭ la malfaciloj

Vang Ginhi diligente studas la brilan verkon de Prezidanto Maŭ Servu al la Popolo.



kaj ni devas konkeri la grandan petrolkampon je altaj rapideco kaj teknika nivelo.”

Ĝuste sub tiaj malfacilaj kondiĉoj, Vang Ginhi kaj la heroaj laboristoj de Daking fondis Daking-petrolkampon.

Tiam la drilmaŝino ankoraŭ ne estis alportita, kaj ĉiutage ili sendis grupanon al la fervoja stacio por informiĝo. Vang Ginhi ne povis kviete sidi kaj bone dormi; li ĉie faris enketon por informiĝi pri la stratumoj. Post kelkaj tagoj, la drilmaŝino estis alportita, sed ne venis gruoj por elvagonigi ĝin kun pezo de pli ol 60 tunoj. Rimarkinte, ke ĉiuj tre maltrankviliĝis, Vang Ginhi diris: “Kvankam ni ne havas gruojn, tamen ni havas homojn. Ĉu Prezidanto Maŭ ne diris, ke la homoj estas la plej valoraj? Se nur estas homoj, ni do povas trovi rimedon por elvagonigi la drilegon.”

Kuraĝigite de la entuziasma grupestro, la junuloj de la grupo tuj ekagis. Unuspire ili laboregis de la mateno ĝis la sunsubiro. Fine ili elvagonigis la maŝinon per ŝnuregoj, stangoj kaj lignopecoj, ĝin portis al la loko por puto kaj starigis la drilturon kun alteco de 40 metroj sur la vasta stepo post pena laboro de tri tagoj kaj tri noktoj.

Tuj komenciĝos la putoborado, tamen akvotuba linio ankoraŭ ne estis instalita. Kiel oni povas drili sen akvo? “Ni prenu akvon per niaj lavpelvo!” iuj proponis. Sed iu ne konsentis pri tio dirante: “Ĉu vi trovis landon, en kiu oni drilas per akvo alportita per pelvoj?” Tiam Vang Ginhi diris laŭte: “Jes, nian landon!”

Kune kun komunumanoj en la ĉirkaŭaĵo de la putoborejo, Vang Ginhi kaj la laboristoj fine alportis dekojn da tunoj da akvo kaj komencis driladon antaŭ la fiksita tempo.

La 14-an de aprilo, 1960, kiam la ruĝa suno leviĝis en la oriento kaj orumis la gigantan drilturon per siaj radioj, homoj vigle laboris sur la putoborejo. Vang Ginhi iris sur la drilmaŝinan platformon, kaptis la bremsostangon kaj kriis: “Ekboru!” Ĉiuj tuj ekagis.

Post streĉa laborado de kvin tagoj kaj kvin noktoj, la unua



Post la instalo de la unua drilmaŝino ili alportis akvon per diversaj ujoj por tuj funkciigi la maŝinon.

puto kreita en la kampanjo ekŝprucigis nafton. Starante ĉirkaŭ la putoborejo kaj vidante la altan ŝprucantan kolonon de nafto, Vang Ginhi kaj la laboristoj tiel ekscitiĝis, ke ili forgesis ĉion kaj laŭte kriadis: “Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!”

La batalo ne ĉiam iris glate. Neatendita akcidento okazis ĝuste post la kreo de la unua puto.

Iumatene, kiam la tago apenaŭ elkrepuskiĝis, Vang Ginhi direktis la laboristojn kuŝigi la drilturon por ĝin translokigi. Subite falis drilstango kun pezo de centoj da kilogramoj kaj vundis lian gambon. Vang Ginhi svenis pro dolorego. Kiam li rekonsciiĝis, li vidis, ke la drilturo ankoraŭ ne estis kuŝigita kaj kelkaj laboristoj estis klopodantaj por savi lin. Li malpacientiĝis kaj diris al ili: “Mi ja ne estas farita el argilo, ĉu mi povus rompiĝi je ektuŝo?” Tion dirinte, li salte leviĝis kaj daŭre direktis la laboron. Sango penetris tra liaj pantalonotubo, ŝtrumpo kaj ŝuo. . .

Gvidantoj kaj laboristoj insiste sendis lin en hospitalon. Sed kiel li povis ripozi trankvile dum ardis la kampanjo? Iutage, Vang Ginhi lame revenis de la hospitalo al la drilista grupo, kun lambastono en sia mano kaj koto sur la bandaĝo ĉirkaŭ lia kruro. Oni rapide aranĝis por li la liton, por ke li ripozu. Sed antaŭ ol pretiĝis la lito, Vang Ginhi jam iris kun la lambastono al la puto.

En la streĉaj tagoj, li laboris tage kaj nokte ĉe la putoborejo. Kiam li malsatis, li prenis buŝojn da seka pano; kiam li sentis dormemon, li kuŝis sur borstangoj kun ŝafpelto kiel kovrilo kaj borilkapo kiel kapkuseno. Ankaŭ en pluvo li persiste laboris ĉe la putoborejo, kun pluvmantelo sur si. Por atingi la grandan celon, li tute ne zorgis pri si mem. Li verkis jenajn versojn por esprimi sian revolucionan entuziasmon:

*Nin regalas la naturo
Per ventum' kaj neĝ-faruno.
Diverslokanoj en kampanjo
Por konker' de l' petrolkampo,
Ho, sturmu! strumu! sturmu!*

Foje por helpi iun drilistan grupon en ĉesigo de puto-ŝprucado, li ne dormis dum du tagoj kaj du noktoj, kaj kiam li revenis al la grupo, li estis kotoplena. Dum manĝado, la bovlo falis el liaj manoj kaj li endormiĝis sin apogante al la muro. Vidante ke li ĉiam pli malgrasiĝis kaj liaj okulkavoj ĉiam pli profundigis, laboristoj admonis kun kora zorgemo, ke li bone ripozu, tamen li diris: “Por konstrui la grandan petrolkampon, mi preferas mallongigi mian vivon je 20 jaroj kaj eĉ oferi mian vivon!”

Loĝantoj en la ĉirkaŭaĵo de la putoborejo vidis ĉion ĉi tion kaj estis profunde kortuŝitaj de la revolucia spirito de Vang Ginhi. Ili diris al laboristoj: “Via grupestro Vang ja estas ferulo!”

De tiam, la glora nomo Ferulo rapide disvastiĝis. La sloganoj “Lernu de Ferulo!” kaj “Disvolu la

Vang Ginhi instalas kune kun aliaj laboristoj la drilmaŝinon en la komenciĝo de la Daking-a kampanjo.



spiriton de Ferulo!” aŭdiĝis tra la tuta Daking-petrolkampo.

Por frue konkeri la grandan petrolkampon, li ne nur rapidigis la putoboradon de sia propra grupo, sed ankaŭ helpis aliajn grupojn rapide kaj bone fari boradon. Se alia drilista grupo bezonis iun maŝinparton, kiun lia grupo havis, li tuj sendis por ĝin porti al tiu grupo; ĉiufoje kiam iu grupo renkontis malfacilon, li mem iris al ĝi kun siaj kamaradoj por helpi. Li diris: “Kiel ajn rapide nia grupo boros, ĝi sola tamen ne povos konkeri la grandan petrolkampon. Ni devas klopodi por ke ĉiuj grupoj boru rapide kaj superu nin, kaj tiam mi vere ĝojegos!”

Dum konkerado de la petrolkampo, li ĉiam laboris atenteme, strebante al pli alta nivelo. Li ofte diris: “Atentu pri la kvalito. Por esti respondecema al la petrolkampo dum la tuta vivo, ni devas esti respondecema pri la kvalito dum la tuta vivo.” Post finborado de ĉiu puto, li senescepte vokis la grupanojn al serioza resumo de sperto. Foje ilia grupo boris puton sub la norma kvalito. Vang Ginhi senhezite diris al la grupanoj, ke ili forlasu ĝin kaj boru novan, kaj poste ĉiujare li vizitis ĝin kun la laboristoj por ke ili memoru la lecionon. Li vizitadis de tempo al tempo ankaŭ la normajn putojn por aŭskulti opiniojn de la petrolprenantoj. Poste, la administracio de la petrolkampo disvastigis lian sperton kaj ĝin starigis kiel regulon.

Kamarado Vang Ginhi zorgis ne nur pri la laboristoj, sed ankaŭ pri la infanoj.

Dank’ al la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, Ferulo kaj la heroaj laboristoj de Daking akiris grandan venkon en la kampanjo por petrolo, sub tre malfacilaj kondiĉoj. La unuan de junio, 1960, Daking liveris la unuan kvanton de nafto; en unu jaro kaj tri monatoj, oni akiris fundamentan konon pri la areo kaj entena kvanto de la petrolkampo; en la tria jaro, oni jam plenumis unuapaŝan konstruadon de la petrolkampo, per kio ili faris grandan kontribuon al la petrola industrio de la patrolando.

En 1964, Prezidanto Maŭ faris la grandan alvokon al la tuta lando “**Lernu de Daking en industrio**”. En tiu jaro, Vang Ginhi glorie ĉeestis la Trian Tutlandan Popolan Kongreson kiel reprezentanto de la laboristoj de Daking kaj vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, kiun li sopiradis tage kaj nokte.

DEFENDI LA REVOLUCIAN LINION DE PREZIDANTO MAŬ

Vang Ginhi ofte diris al aliaj: “En borado de puto, oni devas batali kiel kontraŭ la naturo, tiel ankaŭ kontraŭ la klasaj malamikoj kaj eraraj pensoj. Sen batalo ne povas esti Daking-petrolkampo, sen batalo ankaŭ ne povas veni komunismo. Ni devas revoluciadi, studadi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj bataladi dum la tuta vivo.” Dum la jaroj penplenaj de la Daking-petrolkampa kampanjo, Vang Ginhi estis ferulo sentima al malfaciloj kaj morto en

Post sia elektiĝo en la Centran Komitaton de la Partio, Vang Ginhi fariĝis ankoraŭ pli modesta kaj humila, tute ne apartigante sin de la amaso.



batalo kontraŭ la naturo kaj samtempe obstina, nefleksebla heroo en batalo kontraŭ klasaj malamikoj, erara linio kaj eraraj pensoj.

En aŭtuno de 1960, apenaŭ komenciĝis la kampanjo, renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj kunuloj jam veturis al Daking unu post alia kaj kalumniis, ke la kampanjo estas “ĥaosa batalo” kaj ke “la malorda kampanjo ne aspektas kiel entreprenado de industrio”. Ĉiamaniere ili subfosis la kampanjon. Aŭdinte tiajn absurdaĵojn, Vang Ginhi diris indigne: “Ĉu la kampanjo estas malorda? Laŭ mia opinio ĝi iras tre bone, bonege! Estas Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, kiuj zorgas pri ni kaj ordonis ĉiujn unuojn de petrola industrio de la tuta lando alsendi partoprenantojn kaj alvokis la tutan popolon nin helpi. Ĉu oni povas konkeri la grandan petrolkampon sen kampanjo?”

Por venki la inferan venton kaj persisti en la kampanjo, la partia komitato de Daking-petrolkampo alvokis al la konstruantoj mem konstrui domojn, kulturi kampojn kaj rapidigi la konstruadon de la petrolkampo. Vang Ginhi tuj organizis la familiaĵojn de la oficistoj kaj laboristoj por konstrui domojn per nebakitaj brikoj kaj kolektitaj lignoj kaj kulturebligi teron. Post dujara penado, en 1962 la dua drilista brigado sub lia gvido jam konstruis simplajn loĝejojn kun plankareo de pli ol 7,000 kvadrataj metroj, rikoltis pli ol 25 tunojn da greno kaj pli ol 50 tunojn da legomoj. Kiam frosta vintro venis, ĉiuj laboristoj de la brigado kaj iliaj familianoj jam transloĝiĝis en varmajn novajn domojn.

Plifirmiĝis la decido de la vastaj amasoj de laboristoj por konduki la kampanjon kaj fiaskis la intrigo de la klasaj malamikoj por subfosi la kampanjon.

La ŝtormo de la Granda Proletara Kultura Revolucio rapide envolvis Daking-petrolkampon. En la senprecedence intensa batalo inter la du klasoj kaj du linioj, Ferulo Vang Ginhi spertis ankoraŭ pli rigoran provon.

Por defendi Daking-petrolkampon kaj gajni kompletan venkon de revolucio kaj produktado, preskaŭ ĉiutage dum la plej streĉa tempo de la kultura revolucio Vang Ginhi iris al la drilistaj grupoj por propagandi Maŭzedongpenson kaj serioze efektivi la instrukcion de Prezidanto Maŭ “**teni la revolucion, stimuli la produktadon**”. Sub la influo de anarkisma pensfluo, kelkaj membroj de iu drilista grupo proponis “ĉesigi la produktadon por fari revolucion”. Informiĝinte pri tio, Vang Ginhi speciale rapidis de pli ol 50 kilometroj malproksime al tiu loko, studis la grandan instrukcion de Prezidanto Maŭ,



Vang Ginhi laboras kune kun la laboristoj de la drilista grupo 1205.

kritikis anarkismon kaj malkaŝis la kriman intrigon de klasaj malamikoj kune kun la laboristoj. Li kore admonis ilin: “**‘Teni la revolucion, stimuli la produktadon**’ estas ordono donita de Prezidanto Maŭ al ni laboristaro, neniun minuton ni devas ĉesigi la produktadon. La ŝtato bezonas petrolon por socialisma konstruado, do ni nepre devas preni sur nin la ŝarĝon de tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto.”

Ĝuste pro la persistado de Ferulo Vang kaj la vastaj amasoj de laboristoj, la produktokvanto de nafto de Daking-petrolkampo kreskis grandskale kaj la konstrua skalo de la petrolkampo pligrandiĝis je pli ol cent procentoj.

Dank’ al la hardado de la Granda Proletara Kultura Revolucio, ankoraŭ pli firmiĝis la decidemo de Vang Ginhi en efektivigo kaj defendo de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ. En majo de 1968, kiam fondiĝis la revolucia komitato de Daking, la vastaj amasoj de laboristoj unuanime elektis lin kiel vicedron de la revolucia komitato. En aprilo de 1969, li glorie ĉeestis la Naŭan Kongreson de la Partio kaj estis elektita kiel membro de la Centra Komitato de KPĈ.

Kiam Vang Ginhi ricevis novaĵon pri eltrovo de nova petrolkampo, li tre ĝojiĝis kaj deziris tuj iri kun siaj grupanoj al nova batalo. En la kunveno de la revolucia komitato por diskuti pri subtenado de la konstruado de la nova petrolkampo, li diris emocie: “Rapide konkeri la novan petrolkampon ja estas

grava afero en efektiviĝo de la granda strategia principo de Prezidanto Maŭ **'sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo.'** Ni nepre devas ĉiamaniere helpi ĝin. Mi opinias ke ni devas sendi tien homojn kun alta politika konscio, objektojn de alta kvalito kaj ekipaĵojn en kompleto por garantii, ke la ekspeditoj povu efike labori en malfacilaj kondiĉoj."

Ĉiuj aprobis lian opinion kaj rapide ekspedis bonegan trupon al la nova petrolkampo kun kompleta ekipaĵo. Tuj poste la supera instanco kunvokis kunvenon en Pekino por duafoje subteni kampanjon de nova petrolkampo. Ĉifoje, Daking-petrolkampo ricevis taskon pli pezan ol tiun de la unua fojo. Iuj kamaradoj timis, ke la tasko ne povos esti ĝustatempe plenumita pro tio, ke grandskale malmultiĝis la homoj kaj ekipaĵoj de Daking-petrolkampo, dum ĝia konstrua tasko devas ankoraŭ pli rapide grandiĝi. Ferulo tuj kuraĝigis ilin: "Ju pli peza estas la ŝarĝo, des pli glora ĝi estas; ju pli granda estas la malfacilo, des pli ĝi bezonas sturmadon. Havante la saĝan gvidon de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio kaj la subtenon de ĈPLA, ni kuraĝas porti kiel ajn pezan ŝarĝon. Ni devas preni sur nin la taskon de konstruado de Daking kaj subtenado al novaj petrolkampoj."

La heroaj laboristoj de Daking faris kiel ili diris, kaj ili plenumis la gloran taskon asignitan de la Partio


tute sen ŝanceliĝo. En 1970, kvankam la personaro kaj ekipaĵoj de Daking-petrolkampo reduktiĝis, tamen la produktopovo de la nove konstruita parto multe superis tiun de la antaŭa jaro, la produkto-kvanto de nafto pli altiĝis je pli ol 30 procentoj kaj venko estis gajnita tiel en revolucio kiel en produkto.

TUTVIVA BATALADO POR LA REVOLUCIO

En aprilo de 1970, Vang Ginhi veturis al Jumen por partopreni ĉelokan kunvenon de petrola industrio. Longa trolaciĝo pli kaj pli malbonigis lian saĝon. Antaŭ ol finiĝis la kunveno ĉe Jumen, gvidanta kamarado jam rimarkis, ke li fartas tre malbone, kaj decidis sendi lin al Pekino akompanate de kuracisto por kuracado. Veturante per vagonaro, Ferulo tamen ĉiam deziris reveni al Daking por raporti pri la ĉefa enhavo de la kunveno.

De pli ol dek jaroj, gravaj stomaka malsano kaj artrito turmentadis Ferulon, sed li tute ne zorgis pri ili. Gvidantaj kamaradoj plurfoje diris al li, ke li enhospitaliĝu por kuraco, sed li respondis ĉiufoje: "Ne gravas, malnovaj estas la malsanoj, kiel oni povas zorgi pri tio en tia okupateco!"

Ĉifoje li malsaniĝis tre grave kaj post detala ekzameno kuracisto diagnozis, ke li suferas de stomaka kancero de la lasta stadio. La kamaradoj ekstreme maltrankviliĝis kaj decidis restigi lin en pekina hospitalo. Sub kora zorgo de kamaradoj de la centra



Daking-a Petrola Rafinejo



La Ekspozicia Halo pri la Heroaj Feroj de Ferulo Vang Ginhi

organo de la Partio, koncerna departemento kolektis eminentajn kuracistojn de Pekino kaj aliaj lokoj por kuraci lin. Antaŭ ol fari operacion, gvidantaj kamaradoj diris al li la staton de lia malsano. Tiam Ferulo diris aplombe: “Ne maltrankviliĝu, kamaradoj gvidantoj kaj kolegoj. Mi estas kompartiano kaj mi firme agos laŭ la vortoj de Prezidanto Maŭ timi nek malfacilojn nek morton.” Li kuraĝigis la kuracistojn dirante: “Operaciu sentime. Se vi sukcesos, mi daŭre revoluciados, se vi fiaskos, vi tamen povos akiri sperton.”

Post la operacio, lia sanstato ne boniĝis, tamen li ankoraŭ persistis lernadi kun plej granda revolucia persistemo. Li ofte havis apud sia kapkuseno verkojn de Prezidanto Maŭ, diversajn dokumentojn kaj la *Popolan Ĵurnalon*, kaj ĉiufoje li legis ilin plurajn horojn.

Kuŝante en la hospitalo 7 monatojn, Vang Ginhi ĉiam zorgis pri la disvolviĝo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de la patrolando kaj pri Daking-petrolkampo. Iutage, li informiĝis ke nia lando malkovris novan petrolkampon. Li tre ĝojiĝis kaj diris al aliaj: “Nia lando estas trezora lando; ĝi ne estas ‘malriĉa’ sed ‘riĉa’ je petrolo! Oni nepre devas rapide prospektori ĝin, kaj mi peneg laboros ankoraŭ dekojn da jaroj post resaniĝo.”

Ĉiufoje, kiam gvidantoj kaj kolegoj de Daking vidis lin, li nepre detale demandis ilin, kiel iras la studo de la laboristoj, kiom da novaj putoj estas drilitaj, ĉu novajn inventojn oni faris, kaj ĉu ili renkontis malfacilojn.

Dum sia restado en la hospitalo, li ne nur ofte pripensis demandojn en laboro, sed ankaŭ bone zorgis eĉ pri multaj bagateloj en la vivo de la oficistoj kaj laboristoj. Kiam venis pluva sezono, li demandis, ĉu la loĝdomoj de la oficistoj kaj laboristoj enlasas pluvakvon; kiam neĝis en vintro, li demandis ĉu la akvotubaj linioj ĉe la randoj de la olekampo glaciĝis; informiĝinte ke iuj oficistoj kaj laboristoj estis transpostenigitaj al nova petrolkampo, li demandis, ĉu iliaj familianoj havas prizorgantojn; li prizorgis eĉ la maljunan patrinon de laboristo Ĝang Kigang, kiu oferis sian vivon antaŭ 9 jaroj, loĝantan en malproksima Ŝenhi-provinco, kaj demandis ĉu ŝi havas malfacilojn en sia vivo. Li ankaŭ diris al kamaradoj kiuj venis vidi lin: “Reveninte al la petrolkampo, vi bredu cent aŭ ducent porkojn kaj konstruu varmdomon por kulturi multe da legomoj. Okaze de festoj, vi liveru iom da porkaĵoj kaj legomoj al ĉiu drilista grupo, ĉar ili boradas putojn for de la loĝejoj dum la tuta jaro, devas peneg labori kaj ofte translokiĝi kaj ne havas eblecon por fari tian aferon.”

Kokeriko en Nokto

(Novelo)

ĈIUVESPERE, la dungitoj de Senhaŭtigulo Ĝoŭ devis labori sur kampo ĝis tre malfrua horo. Survoje iuj grumblis: “Ho, kia dormemo!” Aliaj insultis: “Tiu stranga kokaĉo! Ĉiunokte, apenaŭ ni endormiĝas, ĝi jam ekkrias; kaj ankaŭ maljuna Senhaŭtigulo Ĝoŭ havas tiom da energio, ke tuj je la kokokrio li nepre vokas nin al laboro sur la monto. Eĉ post longa laborado sur la monto ankoraŭ ne elkrepuskiĝas.” Iuj diris: “Al riĉulo eĉ koko donas favoron.” La triaj diris: “Sed kial antaŭe la koko kriis ne tiel frue, kiel nun? En tio certe sin kaŝas ruzo. Atendu, mi nepre mortigos la kokon.” Kaj tiel babilante ili revenis al sia

dormejo. Por dormi pli multe, ili kuŝiĝis tuj post manĝo.

En tiuj tagoj Gaŭ Jubaŭ lakis kaj nelonge post sia kuŝiĝo li jam devis leviĝi kaj iri al necesejo. Revenante al la dormejo li iris al la stalo por rigardi, ĉu estas fojno en la trogo. Ĝuste tiam li vidis iun ŝteliranta al la kokejo kun longa bastono en la mano. Tiunokte la luno ne aperis kaj Gaŭ Jubaŭ ne povis vidi klare. Gaŭ Jubaŭ pensis: “Eble li venis por ŝteli kokojn, mi devas krei.” Sed alia ideo kaptis lin: “Ne, li venis por ŝteli kokon certe pro tio, ke li ne havas rimedon por sin vivteni. Se li forŝtelos ĉiujn kokojn, do neniu koko krius kaj ni

Ferulo ĉiam sopiris pri la klasfratoj de Daking-petrolkampo kaj pri ĉio sur ĝi.

Sed kiam venkoj estis atingitaj unu post alia en la petrola industrio de la tuta lando, kiam la laboristoj de Daking sopire atendis la revenon de Ferulo, la malsano de Vang Ginhi pli kaj pli graviĝis.

Informiĝinte ke Ferulo estas en vivdanĝero, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj gvidantaj kamaradoj de la centra organo de la Partio iris unu post alia al la hospitalo por vidi lin.

Gvidantaj kamaradoj de la Ministerio de Hejtaĵoj kaj Kemio, respondeculoj de Daking-petrolkampo kaj malnovaj kunbatalantoj de Ferulo lin flegadis tage kaj nokte ĉe lia lito.

Terura doloro lin turmentadis. Kiam la ŝtala batalanto de la laborista klaso rekonsciĝis el sveno, li premis iliajn manojn kaj diris intermite kaj mallaŭte siajn lastajn vortojn:

“Kamaradoj! . . .bone studu verkojn de Prezidanto Maŭ. . .

“Bone unuiĝu, . . .unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandan venkon. . .”

Nokte de la 15-a de novembro, 1970, por ĉiam forpasis kamarado Vang Ginhi, la ferulo batalinta dum sia tuta vivo por nia petrola industrio, bona filo de nia laborista klaso, bona laboristo, bona partiano kaj bona kadro de Prezidanto Maŭ.

Ferulo vivos eterne en la koro de la popolo.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: “Ni devas elkulturi grandan nombron da homoj, kiuj estas avangardo de la revolucio. Ili estas malproksimendaj en politiko kaj plenaj de batala spirito kaj sinoferemo. Ili estas malkaŝemaj en la animo, fidelaj, aktivaj kaj justamaj. Ili ne klopodas por individuua profito, sed nur por la liberigo de la nacio kaj la socio. Ili ne timas malfacilojn kaj ĉiam firme kaj kuraĝe marŝas antaŭen antaŭ malfaciloj. Ili ne estas arogantemaj malmodestuloj nek parademaj vantuloj, sed homoj kun realisma kaj praktikema spirito. Se Ĉinio havos grandan nombron da tiaj avangarduloj, tiam la tasko de la ĉina revolucio povos esti glate plenumita.”

Ferulo Vang Ginhi estis ĝuste tia avangarda batalanto plenkreskiĝinta sub nutrado de Maŭzedongpenso.



Gaŭ Jubaŭ

okazis en longa momento, kaj li aŭdis ke la ŝtelisto imitis kokerikon. Jubaŭ konfuziĝis. Post tio la homo venis al la bovstalo. Jubaŭ haste kaŝis sin en la fojnotenejon. Tiam la homo atingis la trogon kaj bruligis alumeton por rigardi, ĉu en la trogo estas fojno. En la lumo Gaŭ Jubaŭ vidis, ke li estas neniu alia ol Senhaŭtigulo Ĝoŭ. “Ho, estas li! Do la ‘kokeriko’ en noktomezo estis nur ruzajo de la bienulaĉo!” Sekvante la krion de Senhaŭtigulo Ĝoŭ ekkriis la kokoj en la kokejo kaj ankaŭ ĉiuj kokoj en la tuta vilaĝo. Gaŭ Jubaŭ, plena de indigno, nenion diris pro timo. Senhaŭtigulo Ĝoŭ raŭke kriaĉis: “Kial vi ankoraŭ ne iras surmonten por labori? Jam ekkriis la kokoj!” Tion dirinte li revenis en sian domon por dormi. Gaŭ Jubaŭ paŝis en la dormejon kaj aŭdis plendojn de la dungitoj: “Diablo prenu ĝin. Ni ĵus kuŝiĝis kaj ĝi jam ekkriis. Ĉu tio estas koko?” Maljuna Liu demandis: “Se ne koko, kio do ĝi estas?” “Murdisto! Ni certe mortos pro laco, se ni tiel laboros kelkajn tagojn plue.” Iu diris: “Mi ĵus kuŝiĝis kaj...” Alia grumblis: “Eĉ unu pipon mi ne finfumis.” Gaŭ Jubaŭ pensis, ke ili ankoraŭ ne scias, ke Senhaŭtigulo Ĝoŭ ruzis kontraŭ ili. Li sidiĝis kaj diris al la aliaj: “Rapide ellitiĝu kaj ekiru. Mi rakontos al vi ridindaĵon.” “Kian ridindaĵon? Tuj rakontu!” Ĉiuj urĝigis lin. “Ne, ne nun,” li diris, “mi rakontos survoje.” Ĉiuj rapide sin vestis kaj iris al la monto kun sarkilo sur ŝultro. Sur la vojo ili refoje urĝigis Jubaŭ: “Kion ridindan? Tuj rakontu!” Jubaŭ ekridetis kaj

povos dormi pli multe.” Tiam li vidis, ke la homo streĉis sian kolon kaj kovris al si la nazon per mano. “Atentu!” Gaŭ Jubaŭ ek-timis, “se Senhaŭtigulo Ĝoŭ aŭdos vin, li certe kaptos vin kaj vi havos!” Gaŭ Jubaŭ vidis ke en la trogo estas fojno kaj volis iri dormi, tamen li ne volis fortimigi la ŝteliston. Li kaŭriĝis por spekti kiel li ŝtelos. Sed nenio

diris kun videbla indigno en la nigraj pupiloj: “Onkloj, vi insultu plu ne la kokojn; kulpis ne la kokoj sed homo.” “Kio?” ĉiuj ekmiris. Gaŭ Jubaŭ rakontis al ili pri la imitado de kokeriko de Senhaŭtigulo Ĝoŭ. Aŭdinte tion Maljuna Liu indigniĝis: “Ĉinokte ni ne laboru kaj dormu ĉe la kamprando.” Ĉiuj konsentis. En la lumo de la steloj ili venis al la kampo. Ili demetis la sarkilojn, fumis unu pipon da tabako, kuŝiĝis sur la kampo kaj tuj ekdormis. Tiel dormemaj ili estis, ke ili tuj endormiĝis malgraŭ ke roso tramalsekigis iliajn vestojn.

La imitado de kokokrio en nokto estas tradicia trezoro de la familio Ĝoŭ por sin riĉigi. Iuj diris, ke apliko de tiu metodo komenciĝis de la praavo de Senhaŭtigulo Ĝoŭ. Pro tiu ruzo, dungitoj devis pene labori ĝis la rikoltado kaj fine forkuris ne plu povante elteni la pezegan laboron, tiel ke Ĝoŭ povis ŝpari la pagon al ili.

Dolĉe dormante ĉe kamprando la dungitoj subite sentis doloron. Ili ekstaris kun vekrio kaj vidis,



ke la suno leviĝis jam tre alte kaj Senhaŭtigulo Ĝoŭ kruele batas ilin unun post alia per bastono. Ĉiuj leviĝis. Ĝoŭ kriis kun rondigitaj okuloj: “Vi manĝas ĉe mi, prenas de mi laborpagon, sed tiel vi repagas min? Anstataŭ labori vi dormas ĉi tie. Se vi ne finos la sarkadon ĉi-matene, vi ne havos manĝon.” Li sinturnis kaj diris al la paŝtistodungito: “Hejmen reportu la manĝaĵojn.”

En tiu tago Senhaŭtigulo Ĝoŭ ellitiĝis frue kaj rimarkis ke la dungitoj ne revenis por manĝi. Li pensis: “La dungitoj certe ankoraŭ laboras por mi sur la kampo; mi do sendu manĝon al ili, ke ili manĝu tie kaj ŝparu la tempon por irado, tiel ke ili povos labori pli multe.” Li venigis paŝtiston maljuna Li kaj ordonis lin vektporti manĝon sur la monton. Sed vidinte ke la dungitoj dormas kaj nenion faris, li tiel indigniĝis ke li malpermesis al ili manĝi kaj ordonis maljunan Li hejmen reporti la manĝon. Post la foriro de maljuna Li, li ankoraŭ insultis longe antaŭ ol foriri.

Forte indigniĝis la dungitoj pro tio, ke Senhaŭtigulo Ĝoŭ kaj insultis kaj batis ilin, kaj eĉ malpermesis al ili manĝi. Iuj el ili firme decidis ne plu labori ĉe li, iuj volis reguligi la konton kun li kaj aliaj volis reveni hejmen. Sed Jubaŭ tuj haltigis ilin ridante: “Onkloj, laŭ mia opinio, vi ne devas foriri. Mi havas bonan ideon por venĝi nin per batado de la maljuna kanajlo.” Iuj diris: “Jubaŭ, nia malsaĝuleto, li estas riĉa kaj potenca, kaj lia filo estas centfamiliestro, ĉu ni povus tuŝeti lin?” “Onkloj, li ĉiutage ne lasis nin dormi kaj simple volis mortigi nin per lacigado. Ni devas unue tani al li la haŭton por lin instrui.” Jubaŭ diris sian ideon al la aliaj kaj ĉiuj ridegis konsente: “Bone, ni tiel agu.” Maljuna Liu ĝojis: “Vi etulo ja vere bonan ideon elpensis.” Kiam ili revenis por manĝi en tagmezo, Senhaŭtigulo Ĝoŭ ankoraŭ insultis, sed ili nenion diris.

Post kelkaj tagoj, ĉiuj dungitoj havigis al si bastonon. Post vespermanĝo, ili estingis la lampon kaj lasis Jubaŭ kaŝe observadi el post la pordo. Post iom pli ol unu horo, Senhaŭtigulo Ĝoŭ ŝtelire venis al la kokejo, kaj tiam Jubaŭ tuj ekkriis: “Kaptu ŝteliston!” Ĉiuj dungitoj elkuris, faligis Senhaŭtigulon Ĝoŭ kaj ekbatis. Ĝoŭ kriis: “Ne batu, estas mi.” Ĉiuj respondis: “Ĝuste vin mi ja volas bati. Ĉu vi ankoraŭ venos por ŝteli kokojn?” Jubaŭ kuris en la kortomezon kaj kriis: “Leviĝu, oni ŝtelas, ni kaptis ŝteliston!” Lia krio vekis la japanan oficiron dormantan en la okcidenta domo. Li elkuris kun du servosoldatoj tenante pistolon en

la mano, kriante: “Neniun ŝteliston ellasu, ĉiujn mortigu.” Aŭdinte tion ektimis la edzino de Ĝoŭ kaj kriis en la ĉambro: “Ne batu, ne...” Antaŭ ol ŝi finis sian vorton la oficiro jam pafis dufoje al Ĝoŭ. Senhaŭtigulo Ĝoŭ veis kaj diris: “Estas mi!” Tion dirante li ŝovis sian kapon en la kokejon. La japana oficiro faris paŝon antaŭen kaj volis ankoraŭ pafi, sed tiam la edzino de Ĝoŭ elkuris en konfuzo kaj diris: “Li estas la mastro.” Nur tiam la japana diablo ĉesis pafi. La dungitoj ĉirkaŭis Ĝoŭ kaj diris: “Sinjoro mastro ja neniam venis al la kokejo, kial hodiaŭ li venis ĉi tien en profunda nokto? Lampon!” La edzino de Ĝoŭ alportis lampon el la domo kaj lumigis al Ĝoŭ — Aha, la du kugloj trafis ĝuste lian femuron kaj ĝi senĉese sangis. Kvazaŭ fazano, Ĝoŭ ŝovis sian kapon en la kokejon malgraŭ ke lia postaĵo restis ekster ĝi. Oni eltiris lin kaj vidis ke, lia vizaĝo estis plene kovrita de kokfekaĵoj kaj li ĝemadis ĉirkaŭpremanante la femuron. La dungitoj tiel ĝojis, ke ili devis sin deteni de rideksplodo. Maljuna Liu diris: “Ni ĉiuj prenis vin por ŝtelisto, sed finfine ni vidas, ke estas via moŝto. Tamen kial vi venis kapti kokon en profunda nokto?” Ankaŭ la japana oficiro demandis lin ridante. Senhaŭtigulo Ĝoŭ diris plorante: “Ne parolu pri tio, mi dormis en la domo, kaj, diablo scias, kio pelis min ĉi tien.” Ĉiuj diris: “Ho, kiel danĝero!” Oni portis lin en la domon, ekzamenis kaj trovis ke lia osto rompiĝis. La edzino de Ĝoŭ petis maljunan Liu sendi iun por venigi kuraciston. Senhaŭtigulo Ĝoŭ ofendiĝis, sed kontraŭ neniu li povis plendi. La dungitoj sentis ĝojon pro la venĝo kontraŭ la bienulo, kaj ili diris: “Kiel bone, se la kugloj de la japana oficiro mortigus lin.”

**La aŭtoro naskiĝis en familio de malriĉkampano de Sungiatun-vilaĝo de Fuhian-gubernio, Liaŭning-provinco. En sia infanaĝo li paŝtis porkojn por bienulo Senhaŭtigulo Ĝoŭ, ĉe kiu li suferis ĉiajn maljustaĵojn. Post la liberiĝo de sia hejmvilaĝo, en 1947 li aliĝis al la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj pli poste al la Komunista Partio de Ĉinio. En la Liberiga Milito de la patrolando li akiris meriton. En tiuj jaroj, li lernadis kaj verkadis dum militado. Fine li verkis la aŭtobiografian novelon Gaŭ Jubaŭ, kiu estis eldonita en 1955. Kokeriko en Nokto estas fragmento el tiu novelo. Ĝi koncentre priskribas la kruelan ekspluaton de la bienulo Senhaŭtigulo Ĝoŭ al la dungitoj kaj la batalon de Gaŭ Jubaŭ kaj la dungitoj kontraŭ li. La verko estas tre varme akceptita de la legantoj kaj la fragmento Kokeriko en Nokto estis adaptita al pupa filmo.*

Pupa Teatraĵo

Kokeriko en Nokto

La teatraĵo estas adaptaĵo de la samtitola novelo de kamarado Gaŭ Jubaŭ. Ĝi spegulas la kruelan ekspluaton al kamparanoj fare de bienulo Senhaŭtigulo Ĝoŭ sub la patrono de japanaj imperiistoj kaj la bravan batalon de la subpremataj kamparanoj kontraŭ li.




Por vivteni sin, la 13-jara Jubaŭ servas al bienulo kiel dungito. Li estas tre saĝa kaj obstina. Li havas fortajn amon kaj malamon, kaj kuraĝas batali kontraŭ la bienulo.

Kial la kokoj de Senhaŭtigulo Ĝoŭ kokerikas en nokto? La dungitoj ne scias la kaŭzon kaj ankaŭ Jubaŭ ne povas solvi la enigmon.



Iun nokton, kiam Jubaŭ aldonas fojnon al brutoj, li vidas, ke Senhaŭtigulo Ĝoŭ imitas kokerikon.



Jubaŭ rakontis tion al la dungitoj kaj ĉiuj pleniĝis de indigno. Ili decidas trovi rimedon por puni Senhaŭtigulon Ĝoŭ.

Kiel kutime, Senhaŭtigulo Ĝoŭ pelas per bastono la dungitojn al kamplaboro.



Farmanto Avo Vang estas malsana kaj ne havas la forton por porti grensakon, tial Senhaŭtigulo Ĝoŭ forte batas lin.



Jubaŭ elpaŝas kaj riproĉe demandas al Senhaŭtigulo, kial li batas aliajn laŭvole.


La dungitoj estas plenaj de indigno kaj interkonsiliĝas pri venĝo kontraŭ Senhaŭtigulo Ĝoŭ.





Iun nokton, Jubaŭ kaŝas sin proksime de la kokejo. Kiam Senhaŭtigulo Ĝoŭ venas por imiti kokerikon, li tuj ekkriegas: "Kaptu ŝteliston!"

La dungitoj, kiuj delonge atendas proksime, tuj alkuras kaj forte batas Senhaŭtigulon Ĝoŭ per bastonoj.



La dungitoj antaŭvidas, ke certe Senhaŭtigulo Ĝoŭ venĝos sin kontraŭ ili. Tial ili kaj Jubaŭ foriras sub la gvido de onklo Guo por aliĝi al kontraŭjapana gerila taĉmento.

Disvolvju la Gloran Tradicion de Linfen-brigado

*“Ne timu morton,” nin instruas la Partio
“Kaj ĉiam restu fidelegaj al popolo.”
Sen la subteno de l' popolo kaj kunago de l' naj-
baroj,*

Kiel do povas esti la Linfen-brigada gloro!

Tio estas strofo el la kanto *La Glora Linfen-brigado*, kiu glorigas la heroan bataladon de Linfen-brigado de la Ĉina Popola Liberiga Armeo por la liberigo de la popolo.

Linfen estas grava urbeto en la suda parto de Ŝanhi-provinco. En la printempo de 1948, tiu trupo heroe batalis 72 tagojn subtenate de la polamasoj, faris sian kontribuon en la liberigo de Linfen kaj akiris la gloran titolon Linfen-brigado.

En la pasintaj 23 jaroj, nombro post nombro da novaj batalantoj aldoniĝis al tiu brigado. Sub la helpo de la malnova generacio de batalantoj, kiuj estis harditaj en la revolucia milito, ili lernis kaj disvolvis la revolucionan tradicion kaj bonan stilon de la popola liberiga armeo kaj vigle antaŭenmarŝas laŭ la glora vojo.

POPOLAJ BATALANTOJ AMAS LA POPOLON

Iutage en la pasinta jaro, pli ol 150 novaj batalantoj de la brigado kantante marŝis al Linfen, kondukate de malnova batalanto Li Juanhi, kiu nun estas vicdivizestro de la trupo. En la kampanjo por Liberigo de Linfen, Li Juanhi brave batalis kune kun siaj kamaradoj. Ĉifoje dum la marŝo al tiu urbo, li emocie rakontis al siaj novaj kamaradoj kortuŝajn epizodojn de kunbatalado de la armeo kaj la popolo kaj pri ilia intima rilato por stimuli ilin senlace batali por la interesoj de la popolo.

En Linfen ili vizitis malriĉkamaraninon onklino Ĉen Mudan. Ŝi estas heroa patrino kun profunda

amo al la popola armeo. En la militaj jaroj, ŝi sendis siajn unuajn du filojn al la fronto. Kiam ŝia dua filo martiriĝis, ŝi sendis sian trian filon al la liberiga armeo kaj plurfoje diris al li: “Filĉjo, aliĝinte al nia armeo, batalu brave kiel via frato por la suferanta popolo!” Nun, vidante la bravajn batalantojn, onklino Ĉen kvazaŭ vidus siajn proprajn filojn kaj foje kaj refoje esprimis al ili sian deziron, ke ili ĉiam estu fidelaj al la Partio kaj popolo.

Adiaŭinte al la heroa onklino, Li Juanhi kondukis siajn kamaradojn al la loko, kie li batalis siatempe kune kun popolanoj. Tiam Linfen-brigado ricevis ordonon fari sapeon por detrui la urbomuron per dinamito kaj tiel breĉi la defendan linion de la malamiko. La tasko estis tre malfacila. Informiĝinte pri tio, lokaj popolanoj tuj meminciate venis al ili por helpo. Malgraŭ la kanonfajro kaj venengaso de la malamiko, la armeanoj kaj popolanoj kune fosis sapeon kun longeco de pli ol 3 kilometroj, kiu etendis sin ĝis la antikva urbomuro de Linfen. Per 5,000 kilogramoj da dinamito ili breĉis la muron kaj tiel malfermis vojon por konkeri Linfen. Li Juanhi diris al siaj kunbatalantoj: “La venko de la kampanjo estis gajnita dank’ al la plenforta subteno de la popolo; ĝi estas venko de la popola milito.”

La batalantoj serioze lernis la revolucionan spiriton de la veteranaj milicanoj, la modeloj en subtenado al la fronto, malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj. Krome ili ankaŭ informiĝis pri tio, kiel discipliniĝemaj estis la antaŭaj batalantoj, kiuj estis varme bonvenigataj kaj subtenataj de la polamasoj. Prenante ilin kiel modelojn, la batalantoj ankoraŭ pli bone observas la Tri Ĉefajn Regulojn de Disciplino kaj Ok Punktojn de Atentigo.

Foje, por fari kamuflaĵojn en manovro, kelkaj batalantoj hakis branĉojn de arboj de popolanoj. Poste ili konis ke tio estas eraro, sekve ili iris al la posedanta produkta grupo por fari memkritikon kaj kompensis la perdon per mono. Tio ricevis laŭdon de ĝiaj komunumanoj.

PENEMA LUKTADO EN MALFACILOJ

En la malfacilaj jaroj de milito, la popola armeo ĉiam luktadis kune kun la popolo kaj puŝadis la revolucion al venko. Por ke la junaj kunbatalantoj disvolvu la gloran revolucionan tradicion, la malnovaj batalantoj de Linfen-brigado ĉiam zorge edukadas ilin per siaj modelaj agoj.

En iu nokto de malfrua aŭtuno, laŭ ordono parto de la komandantoj kaj batalantoj de tiu trupo marŝis de granda urbo al loko en montaro kun malfacila trafiko. Tie sur la montoj ĉie kreskas herboj kaj dornoj. Tuj post alveno, la veteranaj batalantoj hakis arbobranĉojn kun la novaj batalantoj. Ili starigis tendojn ĉe montotalio. Nokte, forta vento ululis furioze. En la tendoj, ili sidis en rondo kaj la veteranaj batalantoj rakontis al la novaj batalantoj pri la 25,000-lia Longa Marŝo farita de la Ruĝa Armeo sub la gvido de Prezidanto Maŭ tra neĝa montaro kaj marĉejo por rezisti kontraŭ la japanaj invadantoj en la Nordo, kaj tiamaniere stimulis la novajn batalantojn.

Soldatoj de tiu brigado estis fosantaj sapeon en 1948 por ataki la urbon Linfen.



En frua somero de la pasinta jaro, unu kompanio de Linfen-brigado prenis produktan taskon urĝe transplanti rizidojn en 700 muoj da kampoj por la agrikultivejo. Por kuraĝigi la batalantojn en plenumado de la peza tasko, veterana batalanto Song Kongguang, kiu nun estas politika komisaro de la trupo, venis al la kompanio. Transplantante rizidojn en kampo kune kun batalantoj, li rakontis al ili kiel la armeo partoprenis en produktado por malpezigi la ŝarĝon de la popolo dum la militaj jaroj, kaj tiamaniere li pli profunde komprenigis al la batalantoj la signifon de la produkta laboro de la armeo.

Ĉe garnizonejo de Linfen-brigado troviĝis lago, kiu ofte kaŭzis inundon. Kune kun iu frata trupo la batalantoj de tiu brigado fosis en pli ol 100 tagoj kanalon, kiu povas konduki la akvon de la lago en riveron, kaj kreis 9066 hektarojn da fekundaj kampoj sur la tereno. Per tio ili faris kontribuon al la popolo.

EKZERCO POR TRANSPASO DE RIVERO

Iun nokton, furiozis vento kaj torente pluvegis. Sur la vasta fluo de Jangzi-rivero lignaj boatoj puŝiĝis antaŭen tra ondegoj kontraŭ la vento. La rekognoska kompanio de Linfen-brigado estis en ekzerco pri transpaso de rivero.

Tiunokte, la familianoj de ŝipistino onklino Hoŭ meminciate remis kaj agis kiel vojevigantoj

Soldatoj de iu trupo de Linfen-brigado faras militan ekzercadon en nokto.





Kadroj kaj soldatoj de iu trupo de la brigado helpas lokajn amasojn en konstruado de domo.

por la batalantoj. Ju pli furiozis la vento kaj ondoj, des pli altiĝis la batalvolo de la batalantoj. Ili diris, ke en la pasinteco Prezidanto Maŭ komandis milionon da armeanoj transpasi Jangzi-riveron malgraŭ kanonado de la malamikoj kaj venki la kuomintangan armeon, tiel ke fondiĝis la nova Ĉinio, kaj hodiaŭ la devo de ili estas bone plenumi la trejnadon por defendi la grandan patrimon socialisman.

Sur la larĝa rivero en la nigra nokto, la lignaj boatoj forte skuigadis en la ondaro, jen estis levitaj supren, jen ĵetitaj malsupren. Antaŭ la malfaciloj kaj danĝeroj, la heroaj batalantoj tre zorgis pri la familianoj de la ŝipistino. Iu demetis sian pluvmantelon kaj ĝin surmetis al onklino Hoŭ por ŝin ŝirmi de la vento kaj pluvo, alia staradis apud ŝi por ŝin gardi de danĝero. Firme tenante la direktilon, onklino Hoŭ laŭte kuraĝigis la batalantojn: "Firme tenu vin ĉe via sidloko. Se nur ni vivos, certe vivos ankaŭ vi!"

La boato trairis la torentojn kaj akvokirlojn kaj fine venkis la riveregon. Poste, iu batalanto verkis jenan poemon:

*Jangzi-river' tumultas vaste en la pluv' kaj vento.
Ni malgraŭ ĉio remas trans la akva elemento.
L' armeo kaj l' popolo' kunagas, kiel unu viro,
Nehaltigeblas de danĝeroj kaj de malfaciloj.*

Kvin Filozofiaj Verkoj de Prezidanto Maŭ

(EN ESPERANTO)

Enhavo

- * **Pri Praktiko**
- * **Pri Kontraŭdiro**
- * **Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo**
- * **Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro**
- * **De kie Venas la Korektaj Ideoj de la Homo?**

*296pĝ., Formato 12.7×8.9cm., kun ruĝa
plasta kovrilo*

**Eldonita de la Fremdlingva
Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas la Libroservo
de la Ĉina Esperanto-Ligo,
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio
(Aĉetebla ankaŭ ĉe ĉiuj
perantoj en diversaj landoj)**

Heroa Lando de Agloj

LA heroa lando de agloj sur la bordo de Adriatiko estas granda lumturo de socialismo en Eŭropo.

MALFERMI HISTORIAN VOJON PER ARMITA Batalo

Per siaj sango kaj vivo la albana popolo verkis heroan epopeon de malcedema rezistado kontraŭ agresantoj kaj subpremantoj.

En Vlora-distrikto, ni vizitis la vilaĝon Kuci sur la supro de monto, kie popola heroo Avdula Hakiu fiere rakontis al ni la batalan historion de la vilaĝo: En 1930, tiu montvilaĝo havis nur 40 familiojn de malriĉaj kamparanoj kaj ŝafistoj. La popolanoj de tiu malgranda montvilaĝo faris multajn kantindajn heroaĵojn en sia brava batalo kontraŭ la superregado de Turkio.

Maljunaj gerilanoj de Girokastra faras al junaj milicianoj edukadon pri la revolucia tradicio.



Dum la Dua Mondmilito, italaj faŝistoj denove invadis Albanion. Kvankam la agresantoj surtretis la teron de Kuci, tamen ili ricevis nur kuglojn de malamo kaj fortajn batojn. La popolo de Kucivilaĝo algluis flugfoliojn ĉe la enirejo de la komandejo de la malamikaj ĝendarmoj. Ĝi starigis naci-liberigan komitaton en loko nur malpli ol 200 metrojn fora de tiu komandejo kaj ekzekutis pupan vilaĝestron kaj kvar specialajn agentojn. Iutage, la itala ĝendarma komandejo kaptis du gerilanojn. En la sekvinta tago, ĝi estis ĉirkaŭita, kaj pafoj kaj krioj resonis en la valo. Pli ol 100 malamikoj kapitulacis en paniko. Tiun batalon partoprenis nur 5-6 gerilanoj, kaj la ceteraj partoprenintoj estis kamparanoj-volontuloj. Kiam oni komencis atakon al la malamikoj, nur pli ol 50 personoj sin ĵetis en la batalon, sed je la sekvinta mateno la nombro de la batalantoj jam kreskis ĝis pli ol 250. De tiam, Kuci-vilaĝo fariĝis liberigita regiono kaj fidinda bazo de la gerilanoj.

Post la kapitulaco de la italaj faŝistoj en septembro de 1943, venis la germanaj diabloj. Ili bruligis, mortigis, rabis kaj faris ĉiajn malbonojn. Sed la popolanoj de Kuci-vilaĝo maltimis vivoferon, marŝis antaŭen unuj post aliaj kaj batalis malcedeme. Kamarado Jaho Gjoliku, vicestro de la Sesa Sturma Brigado, revenis al sia hejmloko Kuci-vilaĝo kun la malfeliĉa informo de la martiriĝo de sia filo Mitat Gjoliku. Samtempe kun tio, liaj samvilaĝanoj ricevis informon pri la morto de lia alia filo Ali Gjoliku en batalo kaj vizitis lian domon por konsoli. En la komenco, la vilaĝanoj pensis ke temas pri la morto de

unu filo, sed post pridemando ili eksciis, ke en 3 tagoj mortis liaj du filoj. La malamikoj forrabis la vivon de liaj du filoj, tamen ili neniel povis forigi lian revolucionan volon. En la sekvinta tago li jam partoprenis batalon kun nacia malamo. Inter la konsolantoj en tiu tago sin trovis ankaŭ Shaho Luci kaj ŝia edzo. Kvankam tiam ŝi jam informiĝis, ke ŝia 17-jara filo viktimiĝis en batalo ĉe Saranda, tamen ŝi kaŝis sian malĝojon en sia koro kaj iris konsoli siajn gekamaradojn. En la sekvinta tago, ŝi ricevis oficialan informon pri la morto de sia filo. Transformante malĝojon en forton, la patrino kun ŝtala volo surmetis la uniformon de sia filo, prenis lian pistolon kaj aktive subtenis la batalon en la fronto kun la virinoj de Kuci-vilaĝo sub sia gvido. Ŝia plejaĝa filo estis politika komisaro de gerila bataliono kaj fariĝis oficiro de la sekurecaj trupoj post la Liberiĝo. Li mortis en batalo kontraŭ banditoj en 1949. Hodiaŭ ŝi pendigis la fusilon de sia filo super la liton kaj estas ĉiam preta por bati la malamikon kiu aŭdacos invadi Albanion.

Dum la naciliberiga milito, 370 homoj de tiu malgranda montvilaĝo kun 500 familioj partoprenis gerilajn taĉmentojn. 53 el ili oferis sian vivon por defendi la patrolandon. Post la Liberiĝo, Kuci-vilaĝo disvolvis la revolucionan tradicion kaj firme antaŭenmarŝas laŭ la vojo de kolektivigo difinita de la Partio. Nun ĝi fariĝis unu el la antaŭirantaj kooperativoj de Vlora-distrikto.

REVOLUCIA HEROISMO

La 29-an de novembro de 1944, la ruĝa flago kun dukapa aglo flirtis libere super la tuta Albanio. La batalo tamen ankoraŭ ne finiĝis. Sub la gvido de la glora Albana Partio de Laboro, la heroa albana popolo faris pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la agreso, superrego kaj renversa intrigo de imperiismo kaj la sovetunia reviziisma social-imperiismo.

Ni vizitis komandanton de iu mararmea trupo Dashamir Ohri. Li indigne rakontis al ni la batalon kontraŭ la sovetuniaj reviziistoj ĉe iu marar-




Vastaj amasoj de albanaj laboristoj serioze studas la historion de la Albana Partio de Laboro kaj verkojn de kamarado Enver Hoxha.

mea bazo. En 1958, por disvolvi sian maran armeon, Albanio importis nombron da sovetuniaj militboatoj laŭ interkonsento. Samtempe kun tio grupo de sovetuniaj "specialistoj" venis al Albanio. Tuj post sia alveno, ili disvastigis reviziisman venenon por subfosi la studon de politiko en la albana mara armeo. Ili diris malestime: "Por kio utilas la studo de politiko? Prefere sekvu nin en lernado de tekniko!" Bone sciante ke politiko devas esti metita en komando al militaj aferoj kaj teknikoj, la albanaj kamaradoj metis la studon de politiko en la unuan lokon, firme observante la instruon de la Partio. Fakte tiuj "specialistoj" ja ne volis, ke la albanaj kamaradoj ellernu teknikon. Ili kalumniis, ke la albanaj maristoj devenintaj de laboristoj kaj kamparanoj ne povas ellerni manipuladon de militboatoj pro ilia malalta klereco kaj manko de scioj. Dashamir Ohri diris al ili: "Kiam Lenin konstruis la sovetian maran armeon en la unuaj jaroj de la soveta potenco, ankaŭ li transpostenigis multajn kamaradojn de laborista kaj kamparana deveno el la ruĝa gvardio al ĝi. Ni faras ĝuste la samon. Estas bedaŭrinde, ke vi forgesis vian propran historion!"

La renegata kliko de la sovetunia reviziismo ne nur forprenis ĉiujn ekstrajn maŝinpartojn kaj neniiĝis la teknikajn materialojn kaj dokumentojn, sed ankaŭ perforte forveturigis la militajn boatojn, kiujn ĝi jam donis al Albanio laŭ interkonsentoj.

Kun la revolucia heroismo prefere morti starante ol vivi surgenue, la albana popolo venkis diversajn malfacilojn kaj konstruis fortan maran armeon, kiu efike defendas la marojn de la patrolando.

Antaŭvespere de la 30-a datreveno de la fondiĝo de la Albana Partio de Laboro, la unuaj du hidraŭlikaj generatoroj de la albana hidroelektrajo "Maŭzedong" ekproduktis elektron.



Ju.naj volontuloj de Albanio konstruas ŝtuparkampojn.



Ni vidis ankaŭ la atingojn akiritajn de la albana popolo sur la petrola fronto post la frakaso de la subfosado kaj blokado de la sovetuniaj reviziistoj. En februaro de 1967, inĝeniero M. Shehu kaj teknikisto M. Kepi klopodis por aldoni varmigajn ekipaĵojn al la ole-pumpa stacio por solvi la problemon de koagulo de petrolo por altigi la rapidecon de transfluigo. Por senĉese fari eksperimentadon ili manĝis kaj tranoktis ĉe la laborejo. En la 15-a tago, subite okazis fajrego dum eksperimento. En la viv-morta momento, M. Shehu kaj M. Kepi tute ne zorgis pri si mem sed nur pri la sekureco de la ŝtata posedaĵo. Ili senhezite sin ĵetis al la fajro por fermi la valvon. Kiam iliaj kamaradoj alkuris informiĝinte pri la akcidento, ili jam estis terure brulvunditaj kaj kuŝis surtere en sveno. Kiam Shehu rekonsciiĝis en la hospitalo, li demandis al sia edzino, ĉu oni jam fermis la valvon de la oletubo, kaj li diris al ŝi, ke ŝi bone konservu la partian membrokarton. Kiam Kepi rekonsciiĝis, unue li demandis, kiel estas Shehu kaj la aliaj kamaradoj. Post kelkaj horoj, Shehu kaj Kepi mortis unu post la alia. Post ilia morto la prezidantaro de la Popola Asembleo donis al ili la titolon de socialisma laboro-heroo. Iliaj kamaradoj plenumis la nefinitan taskon de ili, sukcese aldonis varmigajn ekipaĵojn al la ole-pumpa stacio kaj altigis la transfluigan efikon de oleo.

Kun sia heroa spirito, la albana popolo rompis la fortan ekonomian blokadon de la sovetuniaj reviziistoj kaj alvenigis bonegan situacion de revolucio kaj konstruado. En petrola industrio, ĝi ne nur trovis grandan kvanton da petrolo en kalkŝtona tavolo, sed ankaŭ grandan kvanton da natura gaso. La produktokvanto de petrolo en 1970 altiĝis je pli ol cent procentoj kompare kun tiu de 1960.

LA REVOLUCIA TRADICIO TRANSDONIĜAS DE GENERACIO AL GENERACIO

La naciaj sendependeco kaj libero, kaj same la socialisma prospero, estis akiritaj per batalo. Kiel herediĝi la revolucionan batalan tradicion de la malnova generacio al la nova generacio, por ke la ruĝa regpotenco neniam ŝanĝu sian koloron, estas tre grava problemo, sur kiun grandan atenton metis la Albana Partio de Laboro. Nun oni faras al junuloj edukadon pri la revolucia tradicio per diversaj manieroj kaj sendis ilin al praktika revolucia batalo, por ke ili ricevu hardadon kaj provadon.


Junulino Mimoca Bakiri parolis pri sia kompreno el la propra sperto en ricevado de edukado pri

la revolucia tradicio. Ŝi estas lernantino de la lernejo, kiu ricevis la nomon de la popola heroo Asim Zeneli. Ŝi kaj aliaj venis al la loko kie martiriĝis la heroo kaj petis kunbatalanton de la heroo rakonti la heroaĵon de la martiro. Tio okazis je la fino de junio de 1943. La gerila taĉmento atakis trupon de la itala agresa armeo sur la vojo. La batalo iris tre intense kaj daŭris ĝis la dua de julio. Tiutage, la malamiko uzis aviadilojn, alsendis help-trupon kaj batalis per diversaj armiloj kun la intenco rompi la sieĝon por forfuĝi. Kiam la malamikoj preskaŭ akiris la eblecon de forfuĝo, Asim Zeneli alrapidis kun siaj batalantoj kaj tuj lanĉis bravan sturmon kontraŭ la malamikoj kaj kaŭzis al ili multajn mortojn. Kiam la batalo proksimiĝis al la fino, kuglo pafiĝis en la makzelan oston de Asim Zeneli. La kunbatalantoj alkuris por bandaĝi lian vundon, sed li jam ne plu povis paroli kaj trankvile ĉesis spiri, firme premante manon de sia kunbatalanto. La rakonto temis nur pri la lasta batalo de la heroo. Lia vivo kaj la vojo irita de li profunde edukis Mimoca Bakiri. Ŝi firme decidis hardi sin en fidindan daŭriganton de la proletara revolucia afero, sekvante la spuron de la veteranaj gerilanoj. Ŝi memkonscie iris al kamparo, fabrikoj kaj fervojoj por labori volontule kaj bone hardi sin ideologie.

Sur la konstruejo de Librazhd-fervojo kaj en Saranda-montregiono, ni vidis milojn kaj milojn da junuloj laborantaj volontule. La ĉefdirektanto sur la konstruejo de tiu fervojo diris al ni, ke 56,000 gejunuloj jam venis al ĝi por partopreni volontulan laboron. Partoprenante la konstruan laboron de la fervojo, ili studadis la historion de la Albana Partio de Laboro kaj verkojn de kamarado Enver Hoxha. Ili ankaŭ faris diversajn propagandajn kaj amuzajn aktivadojn. La vivecplena revolucia etoso kaj la riĉa enhavo de la vivo rapide altigis politikan konscion de la gejunuloj. Multaj el ili alsendis leteron por peti permeson refoje labori sur la konstruejo. Vidante ke iliaj gefiloj rimarkeble progresis post partopreno de volontula laboro, nemalmultaj homoj skribis al la komandejo de la konstruejo por esprimi sian esperon refoje sendi siajn gefilojn al la konstruejo por hardado. Sub la gvido de la Albana Partio de Laboro, la albanaj gejunuloj marŝas grandpaŝe antaŭen sur la ŝoseo de revoluciigo kaj ili decidis konstrui la patrolandon pli riĉa kaj bela en ĉiu colo da teritorio, kiun defendis la revoluciaj antaŭuloj per siaj sango kaj ŝvito.

**La Ĉina Delegacio de
Ĵurnalistoj al Albanio**

VANG JOŬDE:




Adan en Infana Palaco

AŬTOMOBILO haltis antaŭ la pordo de la Ŝanhaja Infana Palaco kaj eliris el ĝi du albanoj. Unu el ili estis maljuna dum la alia juna. Infanoj tuj entuziasme kondukis ilin en la palacon svingante buntan florbukedon en la mano.

La maljuna estas Adan, sekretario de partia komitato de iu distrikto de Albanio. Li estis partizano. La juna estas kuracisto. Hodiaŭ ili forveturos al sia lando. Kvankam refoje turmentis Adan la vundo ricevita en milito, tamen li tre volis koni kiel vivas la ŝanhajaj infanoj. Tial, li venis al la infana palaco, sub akompano de la kuracisto.

En la palaco regis ĝojo. Infanoj entuziasme kantis kantojn pri la ĉina-albana amikeco kaj dancis gaje. Adan kvazaŭ juniĝis dekojn da jaroj kaj forgesis la doloron. Kiel vigla junulo, li pririgardis la ĉambrojn unun post alia.

Adan venis en la ĉambron de pentra grupo kaj detale rigardis pentraĵon kreitan de infano. En la bildo estas kuraĝa albana knabo kun fusilo sur la dorso. Li marŝas kune kun partizanaĵo batalantoj sur la brulanta tero de Albanio elstarigante la bruston. Liaj okuloj radias per indigna flamo kaj li firme staras kiel fera turo. Adan longe rigardadis kaj liaj okuloj humidiĝis. Li mem ja estis tia par-



tizaneto antaŭ dekoj da jaroj. Por la sendependeco kaj liberiĝo de la Patrio, malgranda Adan militis sude kaj norde en la lando kune kun malnovaj gerilanoj. Nun kvankam jam griziĝis la haroj ĉe liaj tempioj, tamen la kara pasinteco ĉiam teniĝas en lia memoro. Li ne atendis, ke en la lando tre malproksima al la Patrio, ĉina infano reaperigis liajn antaŭajn trajtojn. Adan tre emociiĝis, firme prenis la manojn al la pentristeto kaj diris el profundo de la koro: "Mi kunportos vian pentraĵon kaj metos ĝin en plej bonan kadraĵon, por ke la granda albana-ĉina amikeco fondita de Enver kaj Maŭ Zedong herediĝu de generacio al generacio."

"Enver — Maŭ Zedong, Maŭ Zedong — Enver!" kriis la infanoj.

Inter tiuj amindaj infanoj, Adan forgesis ke li devas forveturi. Tamen restis nur malmulte da tempo kaj Adan kun granda bedaŭro adiaŭis la entuziasmajn infanojn. Ĉi tiuj varme kriis al li: "Ĝis revido, onklo Adan! Bonvolu transdoni niajn salutojn al la albanaj infanoj."


Albana Volebala Teamo en Ĉinio

De la 22-a de januaro ĝis la 12-a de februaro de 1972, la Albana Volebala Teamo faris amikan viziton al nia lando. Ĝi vizitis Pekinon, Ŝanhajon, Kantonon kaj aliajn lokojn, kaj amike faris kun ĉinaj volebalaj teamoj brilajn prezentojn de volebala arto, kiuj estis varme akceptataj de ĉinaj spektantoj. La albanaj

kaj ĉinaj volebalaj sportistoj kune sin ekzercis, lernis unuj de aliaj por altigi la teknikan nivelon kaj tiuj aktivadoj pliapaŭse fortigis la revolucionan amikecon kaj batalan unuiĝon inter la popoloj kaj sportistoj de Ĉinio kaj Albanio.

En streĉa ludo

Ĉinaj kaj albanaj gessportistoj sur Tian-anmen-placo



Altvalora Memorajo

— Dediĉe al la Karbominejo de Hong Gai, Vjetnamio

*Jen karbo nigre brila — mia memorajo plej
valora,
kiun ricevis mi donace de vjetnamo.
Kvankam ĝi flagras ne per brilo ora,
tamen, por ĝi miloble pli sin verŝas mia amo.
Ne pro subtila skulpto-art' ĝi belas,
sed ĉiujn artoverkojn senorname ĝi superas.
Ĉe la fenestro, sur plej hela lok', mi metis ĝin;
pri Hong Gai karbomin' ĝi ofte memorigas min.
Kiam al Ĉangĉengling-aj karb-ministoj mi
ĝin montris,
laŭdoj al la vjetnamaj kamaradoj tuj ektondris.*

*Ho Hong Gai,
heroa urbo de la norda Vjetnamio!
Ho Hong Gai,
heroa karbomino de la norda Vjetnamio!
Sur ĉiu montopinto via pompas floroj ruĝliliaj,
el ĉiu via ŝakto ŝprucas nigra oro.
Nelonge restis mi vizite en minejo via,
sed en oreloj miaj vibras daŭre via kantsonoro.
Nelonge restis mi vizite en minejo via,
sed via batalspir' ĝis nun saturas mian koron.*

*Viaj ministoj estas patriotoj bravaj
kaj pretaj por batali kontraŭ la agres' usona.
Viaj ministoj estas laboristoj kuraĝhavaj,
firmvolaj kun muskoloj ŝtalaj, kor' leona.
Tuj kiam malamikaj flugmaŝinoj venas,
ĉiuj sur sia loko kun pafilo jam postenas.
Kiam forflugas malamikaj jetoj punevite,
ili maŝinojn ree funkciigas plej rapide!
Vi verkas brilan epopeon — en spirito
de nepra venko en batalo — pri popolmilito.*

*Viaj ministoj estas optimisme agorditaj,
ĉiuj renkontas malfacilojn kun spitemo.
Viaj ministoj estas bravaj kaj liberaj de sinĝeno,
ĉiuj parolas senescepte en lingvaĵoj spritaj.
Kiam usonaj bomboj krime pluvas sur la regio-
non,
levante karb-tavolojn kaj amase ŝtonojn,
en la batalpostenoj la ministoj romantikas
per ŝercaj vortoj: “Jen jankioj helpas nin
memvole
kaj tute diligente la terkruston eksplodigas,
elterigante por ni karbon plej fervore.”*

*Via minregiono ravas nin per granda belo:
fruktoĝardenoj, bluaj montoj estas ĉie en pros-
pero.*

*Via minregiono ja tiele riĉas:
ĉie kokosarbaroj kaj rizkampoj kunplektiĝas.
Kaj la usonaj bomboj ne sukcesos vin detrui,
nek en beleco nek en batalvolo, iel skui.
Jen unu ĉe alia estas bombokavoj
turnitaj en fiŝ-lagojn. Krome, arboj de banano
plantiĝis sur la renversitaj teramasoj en ĉirkaŭo.
Ĉio ĉi tio estas ja farita de l' ministaj manoj!*

*Via minregiono estas glora,
flirtas en vento ruĝaj flagoj sub ĉielo blukolora;
via minregiono kun la tuta Vjetnamio
vaste ligiĝas tra diversaj longaj vojoj.
Karbon vi sendas grandakvante al Hanojo;
dank' al ĝi tie estas produktata energio.
En Thai Nguyen via karbo helpas en afinacio;
oni ĝin uzas por plejeble pliprodukti ŝtalon.
Kiam ricevas vian karbon la lokomotivo,
fluge antaŭen tiras ĝi la vagonaron.*

*Ho Hong Gai,
 heroa urbo de la norda Vjetnamio!
 Ho Hong Gai,
 heroa karbomino de la norda Vjetnamio!
 En la komenco de la nova jaro,
 akceptu korajn bondezirojn de la ĉina ministaro:
 pli grandan rapidecon al maŝinoj viaj,
 pli grandan kvanton kaj pli bonan karbon en
 produkto,
 kaj, en la nacisava kaj kontraŭagresa lukto,
 vi restu ĉiam en la fronto kun meritoj pliaj!
 Ho Hong Gai,
 heroa urbo de la norda Vjetnamio!*

*Ho Hong Gai,
 heroa karbomino de la norda Vjetnamio!
 Kvankam de Ĉangĉengling vi estas kelkmil
 liojn for,
 tamen ligiĝas la ministoj ambaŭlandaj kor'
 kun kor'.
 Laŭ la instru' de Prezidanto Maŭ ni vin sub-
 tenos
 plej firme, ĝis la fina, plena venko al vi venos,
 ĝis estos tute forpelita ĉiu agresanto
 de la imperiism' usona el vjetnama lando!*

Pekino, 21 dec, 1971



**SKRIBIS FRANCA LEGANTO
 R.M.**

Plej instruaj por mi estas unuarange la artikoloj pri la vivo en via lando, sed ĉe la sama nivelo mi starigas la kontribuojn pri la amikaj rilatoj inter Ĉinio kaj la aliaj popoloj en la mondo. Estas korvarmige, ke la Ĉina Popola Respubliko havas amikojn en ĉiuj partoj de la mondo, ke la nomo de Prezidanto Maŭ Zedong estas tre grava por la tutmonda paco.

**SKRIBIS ĈEĤOSLOVAKA LEGANTO
 B.G.**

El Popola Ĉinio, kiu tre multe plaĉas al mi, estas la sola sciigilo, kiu respegulas al mi en pura vereco la vivon kaj evoluon de la ĉina popolo kun ĝia kulturo kaj socia vivo.

Ne malmulte mi dankas al vi por la bela murkalendaro 1972,

kiu estas rigardata kun vere tre granda intereso ne nur de esperantistoj sed ankaŭ de gekonatuloj vizitantaj min. Certe ĉiam estas uzataj viaj sendaĵoj inter esperantistoj kaj geamikoj por interesigi ilin por la granda socialisma Ĉina Popola Respubliko.

**SKRIBIS RUMANA LEGANTO
 E.B.**

Konstateble estas ke via revuo multe evoluciis. Ĉiu numero estas aktuala.

Via revuo multe skribas pri problemoj agrikulturaj. Ankaŭ niaj naciaj gazetoj estas densigitaj de artikoloj agrikulturaj.

Mi ŝatus legi pli multajn novelojn, epizodojn interesajn, dirojn saĝajn, proverbojn, poemojn, ĉinajn popolokutimojn de diversaj nacioj en Ĉinio.

Mi estas tre dankema pro viaj artikoloj pri akupunkturo. Mi havas ankaŭ libreton kun sama temo, sed tiu libreto estas tre malgranda.

Mi tre ĝojis vidinte artikolon kaj kolorajn fotojn pri admirinda akrobata arto. Via popolo havas famajn artistojn.

Korespondi Deziras

*F-ino Timbuli Melania, Camin Studentesc C, cam. 217, Galati, Rumanio, 23-j. studentino, pri ŝipkonstruado, mekaniko.

*S-ro Cimpeanu Liviu, str. Cuza Voda 62, Maraŝești, Rumanio, 33-j. inĝeniero en agronomio, kun samfakuloj.

*F-ino Marcean Brandușa, str. Aurel Vlaicu 36, Suĉeava 5, Rumanio, 15-j. lernantino, kun gekolegoj el okcidentaj landoj.

*S-ro Patraș Sorin, str. Arini 10-A, ap. 8, Suĉeava 6, Rumanio, 31-j. inĝeniero-profesoro, kun Afriko, Ameriko.

*Petro Notaerts (51-j.), Draverslapan 10, B-1710-dilbeek, Belgio, kun 2 aŭ 3 ĉinaj esperantistoj.

*Inĝ. Alexandru Tibulka, str. Dumbrava Minunata 13, Falticeni, Rumanio, kun geesp-istoj alilandaj kaj interŝ. librojn, pm kaj pk.



PROSPERAS SILKA INDUSTRIO DE ĜEGIANG

En 1971, vige disvolviĝis la silka industrio de Hangĝoŭ, Vuhing, Ŝaŭhing k.a. lokoj de Ĝegiang-provinco. Sur la bazo de heredo kaj disvolvo de la tradiciaj silkaj produktaĵoj de la provinco, oni kreis multajn novajn specojn. La poliestera-kotonaj kaj poliestera-silkaj ŝtofoj produktitaj de silkteksaj fabrikoj de Hangĝoŭ kaj Vuhing estas tre elegantaj kaj popularaj; la novaj specoj de silkaĵoj produktitaj de la silkteksa fabriko "Ŝengli" de Hangĝoŭ estas tre buntaj; la silkteksa fabriko "Dongfanghong" de Hangĝoŭ restarigis kaj disvolvis la produkton de tradiciaj teksaĵoj, ekzemple pejzaĝaj brokatoj, broteksaj tablotukoj; la tradiciaj silkteksaĵoj kun nacia stilo produktitaj de la silkteksa fabriko de Venĝoŭ kontentigas bezonon de nacimalplimulto en kaj ekster la provinco.

SUKCENO

Samtempe kun energia produkto de karbo, la Fuŝun-a Subĉiela Karbominejo de Liaŭning-provinco ankaŭ aktive disvolvas la produktadon de sukceso kaj akiris kompare bonajn atingojn.

Sukceno estas rara mineralo kunekzistanta kun karbo. Ĝi estas fama produktaĵo de Fuŝun. Sukceno ne nur estas multekosta farmacia drogo kaj parfumo, sed ankaŭ povas esti prilaborita en artaĵojn kaj ornamaĵojn, kiuj estas tre bone akceptataj de la merkato en kaj ekster la lando.

PARO DA FOSILIAJ EBUROJ DE NAMA-ELEFANTO TROVITA EN ĜENGĜOŬ

En Ĝengĝoŭ de Henan-provinco oni trovis paron da fosiliaj eburoj de Nama-

elefanto (*Elephas namadicus*) kaj fosiliojn de ĝiaj ostoj kaj aliaj dentoj. Tiuj fosilioj estas nova materialo por studo pri la geologio, klimato kaj paleovertebruloj de Henan-provinco antaŭ ĉ. 400 miloj da jaroj.

Tiuj fosilioj estas elfositaj en februaro de 1970, el tero 12 metrojn profunda en la okcidenta parto de Ĝengĝoŭ. La tertavolo estas malmola, sableca leoso kun koloro malhelgriza, kiu entenas leosajn aglomeraĵojn kaj konkojn. La fosiliaj eburoj estas malmolaj kaj sendifektaj. Ili havas longon de 3 metroj kaj cirklon de 54 centimetroj. Samtempe estas trovitaj ankaŭ fosilioj de ĉevalo, cervo kaj aliaj vertebruloj. Post determinado de la Instituto de Paleovertebruloj kaj Paleoantropologio de la Ĉina Scienca Akademio, oni konkludis, ke la fosilioj estis de Nama-elefanto. Laŭ ĝia formo kaj deveno ĝi similas al la nuna afrika elefanto. Nama-elefantoj vaste troviĝis en tropika kaj subtropika regionoj de Azio, Afriko kaj Eŭropo dum la meza kaj posta periodoj de pleistoceno, kio montris, ke tiam la klimato de Henan estis pli varma kaj humida ol la nuna kaj apartenis al subtropika klimato.

La fosiliaj eburoj de nama-elefanto en la Muzeo de Ĝengĝoŭ



NOVAJ VENKOJ DE LA SUDVJETNAMAJ ARMEO KAJ POPOLO

En 4 tagoj de la 12-a ĝis la 15-a de januaro, la lokaj trupoj kaj gerilaj taĉmentoj de Phu Yen faris drastan atakon kaj ekstermis ĉ. 350 malamikojn, inkluzive 200 tiujn el sudkorea komplika armeo. Unu tuta kompanio de la sudkorea armeo estis ekstermita. Krome ili detruis 10 militajn veturilojn kaj unu kanonon, ruinigis iujn kazernojn, provizejojn kaj fortikaĵojn, difektis fervojon je 3 kilometroj, kaptis multajn armilojn, municiojn kaj militajn materialojn.

Samtempe, la lokaj trupoj kaj gerilaj taĉmentoj de la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj en Binh Dinh, Quang Da, Quang Ngai kaj Khanh Hoa faris atakon kaj ekstermis kompletajn plotonojn kaj kompaniojn de la malamiko.

LA PATRIOTAJ ARMEO KAJ POPOLO DE LAOSO DAŬRE ATAKIS MALAMIKAJN PUNKTOJN

La patriotaj armeo kaj popolo de Laoso daŭre atakis la restantajn punktojn de la malamiko en la Regiono Sam Thong — Long Cheng kaj akiris novajn venkojn. De la 16-a ĝis la 22-a de januaro, ili ekstermis malamikojn defendantajn sur la monto Phu Moc norde de Long Cheng kaj surprizis la komandejon nove establitan de la "specialaj fortoj"

de Vang Pao sude de ĝi, atakis la punktaron de la malamiko en Na Sou kaj ĝisfunde detruis la tieajn komunikajn sistemojn. Estis ekstermitaj ĉ. 400 malamikoj inkluzive parton da tajlandaj komplikaj trupanoj, kaptitaj kaj detruitaj multaj armiloj kaj militaj materialoj de la malamiko.

LA USONA IMPERIISMO INTENSIGAS LA ARMADON AL THANOM-PRAPHAS-KLIKO

La usona imperiismo senĉese portis armilojn en Tajlandon por armi Thanom-Praphas-klikon kaj samtempe sendis multajn militajn oficirojn al Banko por fari militajn dispoziciojn.

Radio "Voĉo de Tajlanda Popolo" malkaŝis, ke Prasert, direktoro-generalo de la Polica Departemento de Tajlando konfesis en la 21-a de januaro, ke la reacia aŭtoritato de Tajlando jam aldone mendis ĉe Usono nombron da helikopteroj, unu motorŝipon, 32 kirasaŭtojn kaj 2,000 fusilojn. Antaŭ tio Usono transdonis al tiu kliko 60 militajn motorciklojn.

Post kiam C. W. Abrams, komandanto de la usonaj trupoj agresantaj Vjetnamion, venis al Tajlando en januaro por kovi intrigojn, ankaŭ W.J. Mccaffrey, vickomandanto de usona infanterio agresanta Vjetnamion kaj J. S. McCain, komandanto de usonaj armitaj fortoj en Pacifiko, venis unu post alia al Bankoko por diskuti kun Thanom-Praphas-kliko pri "la nuna situacio de la regiono", por ke la reacia aŭtoritato de Tajlando ekspedu pli multe da komplikaj trupoj al Laoso kaj Kamboĝo.



La malamika helikoptero faligita de la Tajlanda Popola Liberiga Armeo.


Prahomaj Postrestaĵoj Trovitaj sur la Firsto de la Mondo

EN la altsitua Tibeto de Ĉinio, konata kiel la firsto de la mondo, la aero estas maldensa kaj la klimato frosta. Tamen, en tre antikvaj tempoj, niaj praavoj jam tie batalis por vivi.


En la Granda Proletara Kultura Revolucio, ĉinaj sciencistoj faris unuafoje grandskalan kompleksan esploron sciencan proksime al Ĝomolangma, la plej alta monto en la mondo. En julio kaj aŭgusto de 1966 ili trovis en du lokoj postsignojn de prahomoj.

Unu situas sude de la vilaĝo Jali, Nielamugubernio, oriente de la ĉina-nepala ŝoseo kaj la rivero Kĵubo, kun alteco de 4,300 metroj super la marnivelo. Estis elfositaj apud la rivero unu ŝtona ilo frapefarita kaj multaj fosilioj de vegetaĵoj. Oni trovis ankaŭ pli ol 20 frapefaritajn ŝtonajn ilojn el siliko, kalcedono kaj kristala kvarco sur la tersurfaco. Plejparto el ili estas malgrandaj iloj. La alia troviĝas sur loko unu kilometron sudoriente de Jangkĵuan ĉe la ĉina-nepala ŝoseo, kun

- ① Malgranda kalcedona kerno
- ② Silika skrapilo kun kurba rando
- ③ Kristala kvarca peco
- ④ Silika kerno



Ĉinaj arkeologoj esploras en la ĉirkaŭaĵo de Ĝomolangma.



Ĝintajlan-o -- Pekina Klozoneo

EN la Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio kaj Afriko okazinta en Pekino, 1971, multaj tablotenisaj teamoj akiris la premiajn pokalojn disdonitajn de la Turniro, kiuj portas sur si bildojn de tablotenisaj pilkoj kaj batiloj ĉirkaŭataj de belaj floroj kiel simbolo de amikeco inter diverslandaj tablotenisaj sportistoj de Azio kaj Afriko kaj kies soklo estis ornamita per bildo de “eterna verdo” (ĉina nomo de rodeo) por simboli la eternan amikecon kaj unuiĝon de la aziaj kaj afrikaj popoloj. Tiuj pokaloj estas faritaj de pekinaj metiartistoj de *ĝintajlan-o* — tradicia metia produktaĵo de Pekino. Tiu metiaĵo trovas altan aprezon de multaj fremdlandaj vizitantoj kaj tiuj ofte aĉetas kelkajn *ĝintajlan-ojn* karakterizatajn per ĉina originala stilo por porti al sia hejmlando kiel memorajon.

Produkto de la metiartaĵo *ĝintajlan-o* en Pekino jam havis longan historion. En la 15-a jarcento la arto venis al sia matura etapo. El la nun konservataj metiaĵoj de tiu speco, la plejparto estas faritaj dum la erao de Ĝintaj (ĝintaj) (1450-1456) de Ming-dinastio (1368-1644), de kiu la metiarto ricevis sian nomon.

La ĉina originala metiarto de *ĝintajlan-o* estas multe ŝatata pro tio, ke ĝi estas belforma kun tre varia ornamdesegno en brilaj koloroj kaj valora tiel por artisma aprezo kiel por praktika uzado en la ĉiutaga vivo. La *ĝintajlan-o* estas speco de kupra objekto, sur kiu metiartistoj laŭ la formo kaj uzado de la objekto allutis maldikajn lamenetajn formantajn diversajn desegnojn el ĉeletej, kiujn oni plenigas per diverskoloraj emajloj. Post bakado, polurado kaj orizado aperas sur la objekto bildo



alteco de 4,900 metroj. Tie oni trovis surtere tri frapefaritajn ŝtonajn ilojn el siliko.

El la jam konataj trovlokoj de primitiva kulturo de la mondo tiuj havas la plej altan situacion.

La tieaj malgrandaj ŝtonaj iloj estas mirinde delikate faritaj. Ekzemple, iloj en maldika kaj longa peco havas larĝecon de laĉo kaj dikecon nemulte pli grandan ol tiu de arbofolio. Sur rando de iuj el ili estas videblaj postsignoj de uzado. Sur la silika ilo elfosita en Jali restas postsigno, kiu montras defrapon de tia longa maldika peco. El tio ni povas konkludi, ke ĝi estas ŝtonkerno uzata kiel materialo por fari ilon. Sed ĝia alia flanko estas formita kiel klingo uzebla por skrapo. Ĝi do estis ankaŭ ŝtonkerna skrapilo. Tiaj ŝtonkernaj skrapiloj estis trovitaj en Ŝenhi, Ŝanhi, Hingiang kaj Nord-oriento de nia lando kaj ankaŭ en Alasko.

Krom tiuj malgrandaj ŝtoninstrumentoj, la aliaj

frapefaritaj ŝtonaj instrumentoj ŝajne konservas ankoraŭ signojn de ŝtonaj iloj el pli antaŭaj tempoj.

La primitivaj kulturoj de ambaŭ nomitaj trovlokoj apartenas al la mezolitiko aŭ al periodo iom pli posta.

El tiuj trovitaj kulturaj postrestaĵoj ni povas fari ĝeneralan supozon pri la vivo de tiamaj prahomoj: ili vivis jam pli progresintan vivon de kolektado kaj ĉasado.

Laŭ analizo de paleontologoj, la vegetaĵaj fosilioj trovitaj en Jali malkovris, ke antaŭe tie dense kreskis vepro kaj la klimato estis pli varma kaj humida ol nun. Tiaj vegetaĵoj kaj klimato estis ĝenerale kompareblaj kun la altmonta vepra zono kun alteco de 3,400 metroj super la marnivelo troviĝanta sur la suda deklivo de Ĝomolangma proksime al Kjunhiang.

kaj desegno en okulfrape brilaj koloroj karakterizaj al *ĝintajlan*-oj.

Ĝintajlan-o estas frukto de ĉinaj metiartistoj post longa praktikado en artisma kreo. Sed en la historio ĝi estis monopoligita de la feŭda reganta klaso kiel ŝatposedaĵo de reĝoj kaj nobeloj nealirebla por la laboranta popolo kaj la popoloj de aliaj landoj de la mondo. Tio malhelpis ankaŭ la rapidan disvolviĝon de tiu metiarto.

El la *ĝintajlan*-oj faritaj dum pli fruaj tempoj, kiuj ĉiuj estas objektoj el reĝaj palacoj, oni povas vidi ke la tiamaj metiistoj jam povis utiligi kompare simplajn emajlojn por krei bildojn lakone faritajn en helaj koloroj. El tiuj faritaj en pli postaj tempoj oni trovas objektojn por ĉiutaga uzado kaj ke estis uzataj novaj emajloj kaj progresis la tekniko de polurado kaj orizado. En King-dinastio (1616-1911) aperis rimarkinda tendenco en tiu metio, nome la influo de la ĉina tradicia pentrarto en ĝia desegnaĵo.

La liberiĝo de la *ĝintajlan*-a metiarto el la kateno de reĝa kortego komenciĝis en la 19-a jarcento. Post la Liberiĝo de Ĉinio ĝi trovas pli bonan medion por progresadi. Multe plimultiĝis nun metiejoj kaj metiistoj de tiu arto. Senĉese kreskas la nombro de ĝiaj specoj kaj multe leviĝis ĝiaj produktokvanto kaj kvalito. Ĝi trovas varman akcepton de niaj amikoj en pli ol 40 landoj kaj regionoj.

Alta tekniko estas bezonata en farado de *ĝintajlan*-oj, aparte en formado de desegnoj el lamenetoj kaj emajlado. Spertaj kaj kvalifikitaj metiistoj ĝenerale kapablas rekte formi desegnojn el lamenetoj kaj aldoni konvenajn brilkolorajn emajlojn sen antaŭpreparitaj projektoj. Por atingi pli altan kvaliton kaj kontentigi en-kaj ekster-landajn bezonojn tiuj veteranaĵoj metiistoj ĉiam ankoraŭ klopodas krei kune kun projektistoj novajn formojn kaj novajn desegnojn en siaj produktajtoj. Fruktojn de ilia diligenta laboro oni povas vidi ĉiujare du-foje en la foiroj de ĉinaj eksportaj varoj en Kantono.

Heredante la intensecon kaj brilecon de la koloroj karakterizajn por *ĝintajlan*-o de Ming-dinastio kaj disvolvante la teknikon de nuancado de koloroj komencitan de King-dinastio, la nunaj pekinaj *ĝintajlan*-aj metiartistoj kreis multajn verkojn kun variaj stiloj, iujn riĉajn je brilaj koloroj kaj aliajn karakterizajn per simpleco kaj gracio. En la ĉefaj kaj ornamaj desegnoj ĝenerale konserviĝas la tradicia stilo de ĉina pentrarto. Estas donita

atento pri versimileco kaj sento de perspektivo de la bildoj. Ili cetere restarigis la uzadon de pli ol dek specoj de fon-desegno brokaĵ-stila jam longe malaperintaj kaj trovis pli ol 40 novajn pli belajn kolorajn emajlojn. Kelkaj el ili estas kun oraj punktoj, tiel ke la produktaĵoj fariĝas pli brilaj per nuancigo de orpunktoj.

En 1959, oni faris fiŝvazegon kun bildo de orfiŝoj kaj akvolilio. La desegnitaj orfiŝoj estas vivaj kaj kun la flosantaj akvoliliaj floroj kaj akvoherboj formas bildon gracie komponitan. La kreaĵo ricevis altan aprezon. La premiaĵoj pokaloj de la 2-a Tutlanda Sporta Konkurso de nia lando en 1965 estas aliaj alte aprezataj *ĝintajlan*-oj kun bildo brile varikolora sur fono de koralruĝo. Ekde la Granda Proletara Kultura Revolucio ili produktis florbotelojn kun bildoj de Jan-an, ŝtalsparkoj k.a., kiuj montras freŝecon, vivecon kaj spiritan fizionomion de socialisma epoko en nia lando.

La tekniko de pekina *ĝintajlan*-o nun troviĝas en daŭra progresado. Oni kreis novajn teknikojn en diversaj laborprocedoj kaj plie levis la kvaliton, tiel ke ĝi atingis tute novan nivelon.

Kolorriĉaj ĝintajlan-aj objektoj



Sur la Kovrilo:

Laboristinoj de la Baŭding-a Fabrika de Kemiaj Fibroj ekzamenas produktaĵojn

Sur la Dorskovrilo:

Aerumaj basenoj de la Pekina Ĝenerala Petrol-kemia Fabrika por purigi uzitan akvon.

Aŭskultu

Esp-an Disaŭdigon

de

Radio Pekino

Por Eŭropo

GMT Vendredo k Sabato
20:00—20:30
Ondoj(m) 47 45 31 25

Por Japanio, Koreio

Pekina Tempo Sabato k Dimanĉo
19:00—19:30
Ondoj(m) 47 40

Por Sudorienta Azio

Pekina Tempo Sabato k Dimanĉo
20:30—21:00
Ondoj(m) 25 19

EL POPOLA ĈINIO

人民中国新闻

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO--LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 4 (165) 1972

Ĉefa Enhavo

Relernado en Jan-an	1
Bonaj "Konsilistoj"	4
Sane Kreski en la Vasta Kamparo	5
Gejunuloj de la Kultivejo Fenghuangŝan	9
Jang Bingkun Akiris Unuajn Fruktojn en Scienca Kulturado de Kotonplantoj	13
Onklo Ĝeng	16
Multvariaj Specoj de Ĉinaj Lanaj Litkovriloj	17
Transmeti la Starpunkton al la Flanko de la Proletaro ...	18
Ŝanĝigo de Jukoŭ	22
Direkti Veturadon per Materiisma Dialektiko	25
Ferulo Vang Ginhi	27
Kokeriko en Nokto (Novelo)	34
Disvolu la Gloran Tradicion de Linfen-brigado	37
Heroa Lando de Agloj	40
Adan en Infana Palaco	43
Altvalora Memorajo	45
Prahomaj Postrestaĵoj Trovitaj sur la Firsto de la Mondo ...	49
Ĝintajlan-o — Pekina Klozoneo	50



Gaja Laboro, Sana Kresko

Aktive respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ "intelektaj gejunuloj iru al la kamparo kaj ricevu reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaĵ mezkamparanoj", vastaj amasoj de intelektaj gejunuloj iris al la kamparo kaj limregionoj. En la lastaj jaroj, ili sane kreskas en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento kaj fariĝis viveplena forto por konstruado de nova socialisma kamparo.



Ili lernas de veteranaj kamparanoj agrikulturajn sciotojn.

Pekinaj intelektaj gejunuloj loĝigintaj en Heĝuangping-komunumo de Jan-an-gubernio interkonsiliĝas kun maljuna terkulturisto pri selektado de maiza semo.



(Sube maldekstre) Intelektaj junulinoj laborantaj ĉe la piedo de Hĵuebamonto, sur la Tibeta Altebenejo, transportas sterkon al kampoj.

Sub gvido de maljunaj malriĉkamparanoj, ili esploras miliajn plantojn en scienca eksperimento.



Intelektaj junulinoj Li Tiemej (la dekstra) kaj Liu Ŝujing (la maldekstra), kiuj loĝiĝis en Mandala-komunumo de la Unuigita Flago Damaŭ, la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, zorgeme paŝtadas kaj klopodas protekti la ŝafaron de la kolektivo en neĝostormo malgraŭ vivdangero, kaj estas honore nomataj kiel "novaj paŝtistoj sur la stepo".





Buji-nacia sanitaristino Huang Jongfen (la dekstra) de Gujgou-provinco estas diplomita mezlernejano reveninta al sia hejmloko por laboradi en ĝi. Ŝi atingis certajn sukcesojn en proventado kaj kuracado de malsanoj kaj estis varme laŭdata de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de tiu loko.

Tiangina intelekta junulo Hua Mengtong (la dua de dekstre) ofte studas la artikolon *Servu al la Popolo* post kiam li fariĝis kuiristo, kaj laboris rimarkinde bone. Li jam glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio.






Intelektaj junulinoj loĝigintaj en Ŝatang-komunumo de Liugou, Guangxi, aŭskultas rakonton de malriĉkamparano pri la grandaj venkoj de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ en la kamparo.



Klozoneaj florvazoj



Prezidanto Nixon
Vizitis Ĉinion

EL POPOLA ĈINIO, 1972



Prezidanto Maŭ Zedong manpremas kun Prezidanto Nixon.




Prezidanto Maŭ Zedong faras seriozan kaj mal-kaŝeman interparolon kun Prezidanto Nixon.

Prezidanto Maŭ Zedong

Intervidiĝas kun

Prezidanto Nixon



Komuna Komuniko

La ĉina kaj usona flankoj atingis interkonsenton pri komuna komuniko je la 27-a de februaro en Ŝanhajo. La plena teksto de la komuniko legiĝas jene :

Komuna Komuniko

Prezidanto Richard Nixon de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko vizitis la Ĉinan Popolan Respublikon laŭ la invito de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj de la Ĉina Popola Respubliko, de la 21-a ĝis la 28-a de februaro, 1972. La Prezidanton akompanis Sinjorino Nixon, Usona Ŝtata Sekretario William Rogers, Asistanto al la Prezidanto Doktoro Henry Kissinger kaj aliaj usonaj oficistoj.

Prezidanto Nixon intervidiĝis kun Prezidanto Maŭ Zedong de la Komunista Partio de Ĉinio en la 21-a de februaro. La du gvidantoj serioze kaj malkaŝeme interŝanĝis opiniojn pri la rilatoj inter Ĉinio kaj Usono kaj internaciaj aferoj.

Dum la vizito, Prezidanto Nixon kaj Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj faris inter si vastajn, seriozajn kaj malkaŝemajn diskutojn pri la normaligo de rilatoj inter la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko kaj la Ĉina Popola Res-

publiko kaj aliaj problemoj interesaj por ambaŭ flankoj. Krome, Ŝtata Sekretario William Rogers kaj Ministro de Eksteraj Aferoj Gi Pengfej okazigis inter si interparolojn en la sama spirito.

Prezidanto Nixon kaj lia grupo vizitis Pekinon kaj rigardis objektojn de kulturo, industrio kaj agrikulturo, kaj ili vizitis ankaŭ Hangĝoŭ kaj Ŝanhajon, kie ili daŭrigis interparolojn kun ĉinaj gvidantoj kaj rigardis similajn interesajn lokojn.

La gvidantoj de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko opinias tion utila, ke ili havas ŝancon, post tiel multaj jaroj sen kontakto, por malkaŝeme prezenti unu al la alia siajn vidpunktojn pri diversaj problemoj. Ili retro-rigardis la internacian situacion en kiu grandaj ŝanĝiĝoj kaj grandaj tumultoj okazas kaj eksplikis sian respektivan starpunkton kaj sintenon.

La ĉina flanko deklaris: Kie estas subpremo, tie estas rezisto. Landoj volas sendependecon, nacioj volas liberiĝon kaj la popolo volas revolucion, tio jam fariĝis nerezistebla historia fluo. Ĉiuj landoj, grandaj aŭ malgrandaj, devas esti egalaj, grandaj landoj ne devas tirani malgrandajn kaj fortaj landoj ne devas tirani malfortajn. Ĉinio neniam estos superpotenco kaj oponas kontraŭ hegemonio kaj potenco-politiko de

ĉiu ajn speco. La ĉina flanko esprimis, ke ĝi firme subtenas la batalojn de ĉiuj subpremataj popoloj kaj nacioj por libereco kaj emancipiĝo kaj ke la popoloj de ĉiuj landoj havas rajton elekti siajn socisistemojn laŭ siaj propraj deziroj kaj la rajton defendi la sendependecon, suverenecon kaj teritorian integrecon de siaj propraj landoj kaj oponi kontraŭ agreso, interveno, superrego kaj renverso farataj de fremdlando. Ĉiuj fremdaj trupoj devas retiriĝi al siaj propraj landoj. La ĉina flanko esprimis sian firman subtenon al la popoloj de Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo en ilia penado por realigi sian celon, kaj sian firman subtenon al la sep-punkta propono de la provizora revolucia registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio kaj la klarigo en ĉijara februaro pri la du ŝlosilaj problemoj en la propono, kaj al la Komuna Deklaracio de la Plej Alta Konferenco de la Hinduĉiniaj Popoloj. Ĝi firme subtenas la ok-punktan programon por paca unuigo de Koreio elmetitan de la registaro de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio en la 12-a de aprilo, 1971, kaj la opinion por la abolo de la "Komisiono de la Unuiĝintaj Nacioj por la Unuigo kaj Restarigo de Koreio". Ĝi firme oponas kontraŭ la revivigo kaj ekspansio eksteren de la japana militarismo kaj firme subtenas la deziron de la japana popolo por konstrui sendependan, demokratian, pacan kaj neŭtralan Japanion. Ĝi firme pledas por tio, ke Hindio kaj Pakistano devas, laŭ la rezolucioj de la Unuiĝintaj Nacioj pri la hindia-pakistana problemo, senprokraste retiri ĉiujn siajn fortojn al sia respektiva teritorio kaj al sia propra flanko de la pafĉesiga linio en Ĝammu kaj Kaŝmiro kaj firme subtenas la pakistanajn registaron kaj popolon en ilia batalo por defendi sian sendependecon kaj suverenecon kaj la popolojn de Ĝammu kaj Kaŝmiro en ilia batalo por la rajto de memdecido.

La usona flanko deklaris: paco en Azio kaj paco en la mondo postulas penadon

por mildigi la nunan streĉan situacion kaj elimini la bazajn kaŭzojn de konflikto. Usono laboros por justa kaj sekura paco: justa, ĉar ĝi kontentigas la aspirojn de popoloj kaj landoj por libereco kaj progreso; sekura, ĉar ĝi eliminis la danĝeron de ekstera agreso. Usono subtenas individuan liberecon kaj sociajn progresojn por ĉiuj popoloj de la mondo, sen eksteraj subpremo kaj interveno. Usono kredas, ke la plibonigo de komunikado inter landoj kun malsamaj ideologioj por malpliigi la danĝerojn de alfrontiĝo unu kontraŭ la alia pro akcidento, miskalkulo aŭ miskompreno estas utila al la klopodo por mildigi streĉan situacion. Landoj devas trakti unu alian kun reciproka respekto kaj voli pace konkuri, lasante ke faroj estu la fina juĝisto. Neniu lando devas sin pretendi ĉiam senerara kaj ĉiu lando devas esti preta denove ekzameni siajn proprajn sintenojn por la komunaj interesoj. Usono emfazis, ke la popoloj de Hinduĉinio devas esti permesataj decidi sian sorton sen ekstera interveno, ĝia konstanta primara celo estas solvo tra intertraktado; la ok-punkta propono elmetita de la Respubliko de Vjetnamio kaj Usono en la 27-a de januaro, 1972 prezentas bazon por la atingo de tiu celo; ne atinginte solvon tra intertraktado, Usono anticipas finan retiron de ĉiuj usonaj fortoj el la regiono konforme al la celo de memdecido por ĉiu lando de Hinduĉinio. Usono konservas siajn striktajn interligojn kun kaj subtenon al la Respubliko de Koreio; Usono subtenos penadon de la Respubliko de Koreio por mildigi la streĉan situacion kaj pliigi kontaktojn en la korea duoninsulo. Usono plej alte taksas siajn amikajn rilatojn kun Japanio kaj daŭre disvolvos la ekzistantajn striktajn ligilojn. Laŭ la rezolucio de la Sekureca Konsilantaro de la Unuiĝintaj Nacioj de la 21-a de decembro, 1971, Usono aprobas la daŭrigon de la pafĉesigo inter Hindio kaj Pakistano kaj la retiron de ĉiuj armitaj fortoj al iliaj propraj teritorioj kaj al iliaj propraj flankoj de la pafĉesiga linio en Ĝammu kaj Kaŝmiro; Usono subtenas la rajton

de la popoloj de suda Azio por konstrui ilian estonton en paco kaj sen milita minaco, ne lasante la regionon fariĝi la objekto de konkuro de grandaj potencoj.

Ĉinio kaj Usono havas esencajn diferencojn en siaj socisistemoj kaj eksteraj politikoj. Tamen, la du flankoj konsentis, ke landoj, sen konsidero pri iliaj socisistemoj, devas trakti siajn rilatojn kun aliaj landoj laŭ la principoj de respekto al la suvereneco kaj teritoria integreco de ĉiuj landoj, neagreso kontraŭ aliaj landoj, neinterveno en la internajn aferojn de aliaj landoj, egaleco kaj reciproka utilo, kaj paca kunekzisto. Internaciaj disputoj devas esti solvitaj sur tiu ĉi bazo sen uzo de forto aŭ minaco per forto. Usono kaj la Ĉina Popola Respubliko estas preparitaj por apliki tiujn principojn en siaj reciprokaj rilatoj.

Konsiderante tiujn principojn de internaciaj rilatoj la du flankoj deklaris:

— progresado al la normaligo de rilatoj inter Ĉinio kaj Usono konformas al la interesoj de ĉiuj landoj;

— ambaŭ flankoj deziras redukti la danĝeron de internacia milita konflikto;

— neniu flanko devas serĉi hegemonion en la azi-pacifika regiono kaj ĉiu flanko oponas kontraŭ penado de iu ajn alia lando aŭ grupo de landoj por establi tian hegemonion; kaj

— neniu flanko estas preparita intertrakti en la nomo de iu ajn tria flanko aŭ atingi interkonsentojn aŭ interkompreniĝon kun la alia direktantaj al aliaj landoj.

Ambaŭ flankoj opinias, ke koluzio de iu ajn granda lando kun alia granda lando kontraŭ aliaj landoj aŭ divido de sferoj de interesoj en la mondo fare de grandaj landoj ĉiuj estas kontraŭaj al la interesoj de la popoloj de la mondo.

La du flankoj retrorigardis la longajn seriozajn disputojn inter Ĉinio kaj Usono. La ĉina flanko reasertis sian starpunkton:

la tajvan-a problemo estas la ŝlosila problemo obstrukcanta la normaligon de rilatoj inter Ĉinio kaj Usono; la registaro de la Ĉina Popola Respubliko estas la sola leĝa registaro de Ĉinio; Tajvan estas unu el la provincoj de Ĉinio, kiu estis redonita al la patrolando antaŭlonge; la liberigo de Tajvan estas ĉina interna afero, en kiun alia lando ne havas rajton por interveni; kaj ĉiuj usonaj armitaj fortoj kaj militaj instalaĵoj nepre devas esti retiritaj el Tajvan. La ĉina registaro firme oponas kontraŭ ĉia ajn aktivado, kiu celas krei “unu Ĉinion, unu Tajvan”, “unu Ĉinion, du registarojn”, “du Ĉiniojn”, “sendependan Tajvan” aŭ distrupteti, ke “la pozicio de Tajvan restas nedecidita”.

La usona flanko deklaris: Usono rekonas, ke ĉiuj ĉinoj sur ambaŭ bordoj de Tajvan-markolo opinias, ke ekzistas nur unu Ĉinio kaj Tajvan estas nur parto de Ĉinio. La usona registaro ne havas disputon pri tiu starpunkto. Ĝi reasertas sian intereson pri paca solvo de la tajvan-a problemo fare de ĉinoj mem. Konsiderante tiun perspektivon, ĝi certigas la finan celon de la retiro de ĉiuj usonaj armitaj fortoj kaj militaj instalaĵoj el Tajvan. Dume ĝi iom post-iom reduktos siajn armitajn fortojn kaj militajn instalaĵojn en Tajvan kun mildiĝo de la streĉa situacio en tiu regiono.

La du flankoj konsentis, ke estas dezirinde larĝigi la interkomprenon inter la du popoloj. Por tiu celo, ili pridiskutis konkretajn kampojn de scienco, tekniko, kulturo, sporto kaj ĵurnalismo, en kiuj kontaktoj kaj interŝanĝoj inter popoloj estos reciproke utilaj. Ĉiu flanko interkonsentas faciligi la pluapaŝan disvolviĝon de tiaj kontaktoj kaj interŝanĝoj.

Ambaŭ flankoj rigardas duflankajn komercojn kiel alian kampon, kiu povas alporti reciprokajn utilojn, kaj opiniis, ke ekonomiaj rilatoj bazitaj sur egaleco kaj reciproka utilo konformas al la interesoj de la popoloj de la du landoj. Ili konsentas

faciligi la paŝo-post-paŝan disvolviĝon de komerco inter la du landoj.

La du flankoj konsentis, ke ili konservos kontakton tra diversaj kanaloj, inkluzive de sendo de supera usona reprezentanto al Pekino de tempo al tempo por konkretaj interkonsiliĝoj por akceli la normaligon de rilatoj inter la du landoj kaj daŭra interŝanĝo de opinioj pri problemoj interesaj por ambaŭ flankoj.

La du flankoj esprimis la esperon, ke la atingoj gajnitaj en tiu ĉi vizito malfermos

novan perspektivon por la rilatoj inter la du landoj. Ili kredas, ke la normaligo de rilatoj inter la du landoj ne nur konformas al la interesoj de la ĉina kaj usona popoloj, sed ankaŭ kontribuos al mildigo de streĉa situacio en Azio kaj la mondo.

Prezidanto Nixon, Sinjorino Nixon kaj la usona grupo esprimis sian dankon pro la ĝentila gastigado al ili farita de la registaro kaj popolo de la Ĉina Popola Respubliko.

La 28-an de februaro, 1972



Prezidanto Nixon atingis Pekinon.
 Gvidantoj de nia lando Ĝou Enlaj, Je Gianjing, Li Hiannian, Guo Mojuo, Gi Pengfej, Vu De k. a.
 venis al la aerodromo por akcepti la gastojn. Ĉefministro Ĝou kaj Prezidanto Nixon manpremas
 sur la aerodromo.

Prezidanto Nixon kaj Sinjorino Nixon ĉeestis artan vesperon laŭ invito, kaj rigardis la revolucion modernan
 baledon *Ruĝa Virina Taĉmento*.
 Ilin akompanis Ĉefministro Ĝou Enlaj, Kamaradino Giang King, Vicĉefministro Li Hiannian, Vicestro de la
 Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso Guo Mojuo, Kamaradino Deng Jingĉaŭ k. a.






Ĉefministro Ĝou interparolas kun Prezidanto Nixon.

Ministro de Eksteraj Aferoj Gi Pengfej faras interparolon kun Ŝtata Sekretario William Rogers.





Akompanate de
Vicĉefministro Li
Hiannian kaj Mi-
nistro Gi Pengfej,
Prezidanto Nixon
kaj Sinjorino Ni-
xon ekskursas sur
la Granda Muro.



Akompanate de
Ĉefministro Ĝou
Enlaj kaj Estro
de la Revolucia
Komitato de Ŝan-
hajo Ĝang Ĉun-
kiaŭ, Prezidanto
Nixon kaj Sinjori-
no Nixon vizitas
la Industrian Eks-
pozicion de Ŝan-
hajo.



Prezidanto Nixon kaj Sinjorino Nixon vizitas la Okcidentan Lagon de Hangĝou.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報